

# EL POPOLA

中國報道

4 1981

# ĈINIO





Maturiĝas la amo kune kun ruĝiĝo de sikomoraj folioj.

## Amo de la ĉinaj gejunuloj

Fotoj de ZHANG WEI

La ĉinaj gejunuloj liberiĝas iom post iom de la malnova moro. Ĉiam videblas paroj kaj paroj da feliĉaj geamantoj, ĉu en parkoj kaj sur stratoj de la urbo aŭ sur kampaj vojetoj de la vilaĝo.

Ekde 1980, en multaj lokoj aperis svatagentejoj por la gejunuloj. Krome ofte okazas baloj, ekskursoj k.a. por havigi al ili pli da ŝancoj kontaktiĝi kaj gefianĉiĝi.

En la litĉambro de novgeedzoj



Novgeedzoj en fotografejo









Svatagentejo



En dolĉa amo



Ili sin registras en svatagentejo.



Svatistino rekomendas.

Ŝi ĝoje legas amleteron.



En ĉiu marto la baj-naciecaj gejunuloj promenas ĉe Papililago kaj verŝas sian amon unu al alia.





Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

## SUR LA KOVRILO:

He Jufang, talenta baletistino, sukcese ludis la ĉefan rolon en la baletoj "Cigna Lago", "Knabineto kun Alumetoj" k. a. Nun ŝi jam fariĝis ĉefa aktorino de la Beijing-a Baleta Trupo.

Foto de ZHANG WEI

## SUR LA DORSKOVRILO:

Narciso

Ĉinstila pentraĵo de  
GUAN SHANYUE

## KOLORAJ SERIOJ:

Amo de la ĉinaj gejunuloj

Mogan-monto

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj  
de E-istoj

Vesperigo post fulmotondro

Kantoj kaj dancoj de gaŭŝan-oj

Ŝtonaj skulptaĵoj de Dazu

## NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Torento de Changjiang-rivero  
barita ĉe Gezhouba

Velado sur glacio

Subtera kanalo

Porinfanaj legaĵoj kaj infanoj-  
legantoj

La tu-aj virinoj amas sporton

—◆—  
Generala distribuanto: Esperanta  
Sekcio de GUOJI SHUDIAN  
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## Enhavo

Granda konstruaĵo por jungi Changjiang-riveron . . . . .	2
Verku por EL POPOLA ĈINIO . . . . .	5
Novaj ŝanĝigoj de la ĉina kamparo	
Ĝojo de la kamparanoj de Shandong . . . . .	6
Impreso pri la tibeta kamparo . . . . .	7
Novaj aferoj en mia hejmloko . . . . .	8
Vizito al foiroj de Beijing . . . . .	9
Juĝdecido de la popolo . . . . .	12
Por ke pli da gejunuloj fariĝu feliĉaj paroj . . . . .	14
SUR NIA LIBROBRETO: Guto post guto . . . . .	16
Naskiĝo de novaj civitanoj . . . . .	17
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Perlo enterigita en dezerta monto	21
VIDINDAJ LOKOJ: Agrabla somerumejo — Mogan-mon- taro . . . . .	24
INTER NI: Kial en EPC mankas korespondanconoj de ĉinaj esperantistoj? . . . . .	25
NIA KULTIVEJO:	
Teoria fundamento de Esperantismo . . . . .	26
Manko de komuna lingvo — kapdoloro de Eŭropa Komunumo . . . . .	28
Korespondado amikigas . . . . .	29
Inaŭgura kunveno de la Pekina Esperanto-Asocio . . . . .	30
KULTURAJ NOTOJ . . . . .	31
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	32
Por elimini internacian ekonomian diskriminacion . . . . .	34
Konstruado kaj mastrumado de metan-baseno . . . . .	37
AMIKECO: Menuhin kaj liaj ĉinaj lernantoj . . . . .	40
Ne demandu, pro kio estas tio . . . . .	42
Yan Ying en Chu-regno (Ĉina Antikva Spritaĵo) . . . . .	43
Baldaŭ pariĝu la blankaj simioj . . . . .	44
KALEJDOSKOPO . . . . .	45
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	46
SPORTO . . . . .	47

# Granda konstruaĵo por jungi Changjiang-riveron


**J**E la 4-a de januaro de la kuranta jaro la tria granda rivero de la mondo Changjiang (Jangzi-rivero) estis interrompita de la barajo Gezhouba. Tiutage la akvo de la supra parto de Changjiang fluis orienten unuafoje laŭ homa volo tra la akvoellasa kluzo malfermita antaŭ du tagoj. Baldaŭ efektivi-

ĝos la deziro de la ĉina popolo rezervi superakvon en la trunka fluo de Changjiang por produkti elektron.


Changjiang kun longeco de pli ol 6,300 kilometroj estas la plej longa rivero de Ĉinio. Ĝi fontas el la "tegmento de la mondo" Qinghai-Tibeta Altebenaĵo kaj trafluas dek provincojn,

municipon kaj aŭtonoman regionon de Ĉinio. Ĉiujare meznombre mil miliardoj da kubmetroj da ĝia akvo forfluas en maron. Laŭ akvokvanto ĝi okupas la kvaran lokon en la mondo kaj estas iom malpli granda nur ol Amazono en Sud-Ameriko, Kongo en Afriko kaj Gango en Hindio. Laŭ unuapaŝa statis-

*Por ŝtopi la breĉon*







tiko, la ekspluetebla kaj utiligebla akvoenergio de la trunka kaj branĉaj fluoj de Changjiang estas 230 milionoj da kilovattoj, kiuj konsistigas 40% de la totala akvoenergio de la riveroj de Ĉinio kaj estas 1.5-oblo de tiu de Usono.

En la supra baseno de Changjiang troviĝas altaj montoj kaj ravinoj kaj la niveldiferenco de tiu parto superas 5,000 metrojn. Precipe la Tri Gorĝoj de Changjiang kun longeco de 204 kilometroj, ambaŭflanke de kies bordoj ĉielskrapas montoj kun kontinuaj rokmuroj, estas ideala loko por konstrui grandan hidroelektron. La ĉina registaro decidis konstrui akvoutiligan pivotan konstruaĵon ĉe la Tri Gorĝoj kaj komencis pretigi por tio homfortojn, teknikojn kaj materialojn. Post pluraj esploradoj de akvomastromaj specialistoj kaj permodelaj eksperimentoj kaj komparado de projektoj oni decidis unue

konstrui akvoutiligan pivotan konstruaĵon ĉe Gezhouba proksime de la elirejo de la Tri Gorĝoj. La konstruaĵo servos por kompletigi la pli grandan akvoutiligan konstruaĵon de la Tri Gorĝoj.

En la komenco de 1979 mi vizitis la konstruejon de Gezhouba. Iu respondeculo de la konstrua buroo diris, ke la multuza akvorezervejo de Gezhouba estas la unua granda akvomastroma konstruaĵo sur la trunka fluo de Changjiang, kaj ĝia barajo situas proksime de la urbo Yichang de Hubei-provinco je 3 kilometroj for de la elirejo de la Tri Gorĝoj. Tie la riverlito abrupte larĝiĝis de 300 metroj al 2,200 metroj kaj en ĝi troviĝas du insuletoj Gezhouba kaj Xiba, kiuj dividas Changjiang en la Riverojn Unuan, Duan kaj Trian. La Unua Rivero estas la ĉefa fluejo kaj la Dua kaj Tria servas nur por tralasi akvon dum inundsezono. Utili-

gante tiun favoran naturan kondiĉon oni elektis la lokon por konstrui la barajon kaj nomis ĝin per la nomo de la insuleto Gezhouba. La konstruado estos plenumita en du periodoj. En la unua la konstruado iris sur la Dua kaj Tria Riveroj, dum sur la Unua Rivero daŭras normala navigado. En la dua periodo, kiam la konstruado sur la Dua kaj Tria Riveroj finplenumiĝos kaj oni komencos produkti elektron, la Unua Rivero estos interrompita kaj sur ĝi oni komencos konstruadon protektate de ĉirkaŭdigo.

La multuza akvorezervejo de Gezhouba konsistas ĉefe el riverbarajo, elektraj, ŝipkluzoj, akvotralasa kluzo, sabloforlava kluzo kaj fiŝvojo. La barajo kun longeco de 2,561 metroj kaj alteco de 70 metroj povas regi basenan areon de miliono da kvadrataj kilometroj. La kapacito de la akvorezervejo estos 1,580 milionoj da kubmetroj.

La du hidroelektreroj dislokiĝos respektive sur la Riveroj Unua kaj Dua kun totala generatora kapacito de 2,715,000 kilovattoj kaj ĉiujare povos produkti 13.8 miliardojn da kilovattoroj.

Sur la barajo Gezhouba estas tri ŝipkluzoj, inter kiuj la unua kaj dua apartenas al la plej grandaj kluzoj de la mondo. Ili ĉambroj larĝas po 34 metrojn kaj longas po 280 metrojn kaj povas trapasigi dekmil-tonelajn ŝipojn. Post finplenumiĝo de la konstruado la akv-nivelo de la fluo en la Tri Gorgoj kun longeco de 100 kilometroj leviĝos de 20 metroj. Tiam la rifoj kaj malprofundajoj endanĝerigantaj la navigacion profunde subakviĝos kaj la nokta navigado estos senĝena.

La 27-porda akvotralasa kluzo kaj 12-porda sabloforlava kluzo servantaj por reguligi la akv-nivelon kaj protekti la barajon povos tralasi 110,000 kubmetrojn da akvo ĉiusekunde. Dank' al la fiŝvojo la migrantaj fiŝoj povos transnaĝi la barajon por fraji. Kaj krome, sur la barajo estos fervojo kaj ŝoseo interligantaj la nordon kaj la sudon.

En la novjara tago de 1981 mi venis al la konstruejo de Gezhouba kaj vidis kortuŝan scenon: Sur la Riveroj Dua kaj Tria staras alta akvotralasa kluzo, fabriksdomoj de la elektrero, sabloforlava kluzo kaj du ŝipkluzoj. La fluejo de la Unua Rivero estis mallarĝigita kaj puŝita flanken. La du partoj de


la digo etendiĝantaj de ambaŭ bordoj katenis la riveron kaj la malobeema torento devis trapasi "drakan buŝon" kun larĝeco de 210 metroj.

Por interrompi la fluon oni devis ŝtopi la "drakan buŝon". En la pasinteco oni faris similan laboron ĉe Sanmen-gorgo de la trunka fluo de Huangherivero (la Flava Rivero) kun la plej granda flukvanto de 2,030 kubmetroj ĉiusekunde kaj ĉifoje la flukvanto de la torento atingis 4,720 kubmetrojn. Kompreneble la tasko estis tre malfacila. Ĝi estis rigora provo por la konstruantoj.

Je la sepa kaj duono de la 3-a de januaro la komandejo ordonis interrompi la fluon kaj

*Ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj diskutas pri preventado de ŝlima sedimento en la naviga vojo.*

*La akvoellasa kluzo*





tuj ekboliĝis la tuta konstruejo. La bruado de ĉ. 500 gigantaj maŝinoj superis tiun de Changjiang. Sur la tenejo de materialoj, arganoj kaj elektraj ŝoveliloj ŝargadis per kolosaj ferbetonaj kvaredroj kamionojn kun kapacito de 25, 30 aŭ 40 tunoj. La plensarĝitaj aŭtoj veturis al la "draka buŝo" laŭ la vojo sur la digo, kaj 4 kubmetroj da materialoj estis verŝitaj en la riveron meznombro en ĉiu naŭo da sekundoj. Iu inĝeniero diris, ke enverŝado de tiel granda kvanto da materialoj neniam antaŭe okazis en la ĉina historio akvomastroma.

En 13 horoj post la komenco de la fluointerrompo Changjiang devis cedi sian rivervojon en rapideco de pli ol 6 metroj ĉiuhore. Kiam la "draka buŝo" mallarĝiĝis ĝis ĉ. 100 metroj, la laboro por la fluointerrompo devus ĉesi portempe laŭ la plano kaj iel pligrandigi flukvanton de la Riveroj Dua kaj Tria por faciligi pluan laboron. Sed analizinte la staton, la specialistoj de la komandejo opiniis, ke pli fortaj maŝinoj estas disponeblaj ol en la plano kaj la kvanto de la pretigitaj materialoj estas preskaŭ 2-oblo de tiu de la plano, kaj ke se oni zorgeme organizos kaj kontinue konstruos, oni do certe povos kompletigi la barajon pli rapide.

En la sekvanta tago la "draka buŝo" fariĝis nur 20-metra kaj la konstruado pli malfacila. Kvaredraj piramidaj betonblokoj pezaj po pli ol 1 tuno ĵetiĝis en la torenton. La rapideco de la fluo en "draka buŝo" estis 7 metroj po sekundo kaj la nivel-diferenco estis 3,23 metroj. Por ŝtopi ĝin oni kunligis 3-4 25-tunajn betonajn kvaredrojn en

grapolon kaj samtempe ĵetis ilin de ambaŭ bordoj en la "buŝon" kaj poste aliajn materialojn kaj fine sukcesis la fluointerrompo. La tuta laboro por interrompi la fluon daŭris 36 horojn.

La sukceso de la fluointerrompo markis finiĝon de la unua periodo de la konstruado de la nomita akvorezervejo kaj komenciĝon de la dua periodo.

Post la finplenumiĝo de la fluointerrompo, la konstruantoj sin ĵetis en la novan laboron. En la 5-a de januaro neĝegis, frostis kaj la vojoj fariĝis kotaj. Sed sur la konstruejo navede rapidis homoj kaj veturiloj. En tiu tago sola la ĉirkaŭdigo de la rivero jam plialtiĝis je pli ol 3 metroj kaj sur ĝin verŝiĝis 40,000 kubmetroj da tero kaj

ŝtonoj. La ĉirkaŭdigo de la Unua Rivero estas ŝlosila konstruaĵo kontraŭ superakvo. Nun dekoj da maŝinoj laboras tie tage kaj nokte. Laŭ la plano la rivero povos malfermiĝi al trafiko kaj produkti elektron en junio de la kuranta jaro.



## Verku por EL POPOLA ĈINIO

**L**A 25-a de septembro de la kuranta jaro estos la 100-jara jubileo de la naskiĝtago de Lusin, la fondinto de la moderna ĉina literaturo kaj aktiva subtenanto de Esperanto. La 19-a de oktobro estos la 45-a datreveno de lia forpaso. Por memori pri la granda verkisto ni aperigos specialajn artikolojn pri li en nia gazeto. Ni esperas, ke diverslandaj legantoj sendos al ni:

1. artikolojn kaj fotojn por memori pri li,
2. artikolojn pri liaj vivo kaj verkoj,
3. eseojn kaj recenzojn pri liaj verkoj,
4. aliajn materialojn pri li.

La kontribuajoj devas atingi nin antaŭ la 31-a de aŭgusto. La samideanojn, kies kontribuajoj aperos en nia gazeto, ni rekompencos per ĉinaj metiartaĵoj aŭ Esperantaj libroj. Iuj el la verkoj konvenaj por la ĉina publiko estos ĉinigitaj kaj publikigitaj en ĉinaj ĵurnaloj kaj gazetoj, por ke oni vidu la utilecon de Esp-o en internacia kultura interŝanĝo.

— La Red.

# Novaj ŝanĝiĝoj de la ĉina kamparo

*El la miliardo da ĉinaj loĝantoj 80% estas kamparanoj. Oni povas diri ke la ekonomia disvolviĝo kaj politika stabileco de la lando dependas ĉefe de la ekonomia situacio de la kamparo. Por helpi niajn legantojn koni la nunan staton de la ĉina kamparo, ni publikigas jenajn tri artikolojn.*

— La Red.

## Ĝojo de la kamparanoj de Shandong

de NAN ZHENZHONG

En 1980 ĝojinda ŝanĝiĝo aperis en la longe mizeraj subprovincoj Heze, Liaocheng, Dezhou kaj Huimin. En tiu jaro kvankam la grena produktokvanto iom reduktiĝis, tamen la kotona produktokvanto 3.5-obliĝis kaj la produktokvanto de sojfabo, ternukso, sezamo kaj aliaj oledonaj plantaĵoj plimultiĝis grandprocente. La totala enspezo de agrikulturo plimultiĝis je 57.3%. Ekz. en la subprovinco Heze, kiam la unuaj kotonaj kapsuloj fendiĝis, oni taksis la produktokvanton je ĉ. 60,000 tunoj, sed neatendite, la rikoltita kotona produktokvanto eĉ superis 100,000 tunojn.

“Tute ekster nia atendo!” nemalmultaj tiel diris. Kvankam ĉiuj grenaj stacioj kaj aĉetejoj

pliigis personojn kaj grandigis tenejojn antaŭ aŭtuno de 1980, tamen la tro multaj greno, kotono kaj oleaj produktaĵoj embarasis la laborantojn. Multa kotono devis esti stakigita ekster la domo, ĉar la tenejoj estis jam plenigitaj. En la korto de la grenaj stacioj ĉie videblas montoj da sojfabo kaj ternukso. En la 20 jaroj de 1958 ĝis 1978, la greno bezonata de Dongming-gubernio estis provizata de la ŝtato, sed en la pasinta jaro ĝi akiris abundan rikolton de greno kaj kotono. En tiu jaro la tenejoj de la gubernio estis rapide plenigitaj de la tritiko, sojfabo, ternukso kaj sezamo aĉetitaj de la ŝtato.

Sed la plej ĝojinda ŝanĝiĝo estas la distribuo inter la komu-

numanoj. Antaŭ 1979 tiuj subprovincoj estis rigardataj kiel kvar el la dek plej malriĉaj subprovincoj de nia lando. En 1978 la meznombra enspezo de la komunumanoj estis nur 46 juanoj. En duono de la produktaj taĉmentoj de tiuj subprovincoj la taga grena porcio de ĉiu loĝanto estis malpli ol 0.5 kg., sed en 1980 la enspezo de komunumano pli-ol-duobliĝis. En la subprovinco Liaocheng, el la 1,020,000 kamparanaj familioj la jara enspezo de pli ol 600,000 familioj superis pli ol 500 juanojn kaj tiu de pli ol 3,000 familioj superis 3,000 juanojn. En multaj komunumanoj kaj brigadoj la komunumanoj ricevis tiom da kontanta mono, kiom egalas al ilia totala sumo ricevita antaŭe en pluraj jaroj. Yu Shanhai de Liguantun-komunumo de Xiajin-gubernio, prenante la ricevitan monon, diris al komunumano respondeculo Xu Wanyi: “Ĉu mi estas en sonĝo?” “Tio estas realo!” ridis la lasta.



Mi trifoje estis en vilaĝoj de Gaotang- kaj Dongming-gubernioj. En la antaŭaj du fojoj mi vidis nur mizeran fizionomion. Nemalmultaj familioj vivis en manko de greno kaj kunpremiĝis en malaltaj kabanoj. Sed antaŭ nelonge mi refoje venis al tiuj lokoj kaj trovis, ke ĉie la kampuloj radias de ĝojo. Iuj konstruas novajn domojn, aliaj preparas geedziĝan ceremonion, triaj veturas kun siaj familianoj al la gubernia urbo por viziti teatrojn, kiuj ofte estas plenaj de rigardantoj.

La ŝanĝiĝoj havas kaŭzojn multflankajn, el kiuj la plej ĉefa estas efektivigo de plantado laŭ lokaj kondiĉoj kaj praktikado de sistemo de produkta respondeco. Tiuj kvar subprovincoj de Shandong-provinco taŭgas por kulturi kotonon. Tamen, influate de la penso de alta takso de greno kaj malalta takso de kotonon, ili plantis kotonon en sterilaj kampoj kaj donis bonan sterkon al la grenaj kampoj, rezulte de tio la kotona produktokvanto reduktiĝis, sed la grena produktokvanto ne multiĝis. Ekde 1979 ili forlasis tiun eraran rimedon kaj komencis prizorgi samtempe la produktadon de greno kaj kotonon, precipe la lastan, tiel ke ili akiris abundan rikolton de greno kaj kotonon.



*Kamparanoj de Shandong rikoltas kotonon.*

## Impreso pri la tibeta kamparo

de XIE BANGMIN kaj QUN SANG

En la komenco de 1980 la Centra Komitato de KPĈ donis instrukcion pri la tibeta laboro, en kiu CK alvokas la tibetan popolon likvidi malriĉe-

con kaj strebi al riĉeco kaj konstrui Tibeton en solidaran, riĉan kaj civilizitan regionon. Kia do estas la hodiaŭa vivo de la tibeta popolo post unujara

praktikado de tiu instrukcio? Lastatempe ni vizitis Shannan-regionon.

Zhaxilin de Zhanang-gubernio estas fame konata malriĉa valo. Ambaŭflanke de ĝi estas du brunaj kalvaj montoj. La mallarĝa ravino estas profunda kaj senakva. Ni vizitis komunumaron Suolangduoji. Kiam ni

atingis lian domon, li estis teksanta lanan ŝtofon. En pli ol duonjaro li teksis 5 rulojn da lana ŝtofo per sia kapitalo kaj 23 rulojn por aliaj, kaj kontraŭ ĉiuj tiuj li ricevis 10 kg. da butero, 9 kg. da vegetalino, 1 bovono, 2 ŝafojn, 70 kg. da sekalo, 15 kg. da ŝaflano kaj krome 300 juanojn. En 1980 li ne nur havis sufiĉe da greno, sed ankaŭ havigis al siaj edzino kaj infanoj novajn vestojn. Ĉiutage ili trinkas buteran teon kaj ĉiumonate faras sekalvinon.

La komunuma estro diris al ni, ke la vivo de la familio de Suolangduoji estas nur meze bona. La kvara produkta taĉmento havas 40 familiojn, sole la meznombra enspezo de flankaj okupoj por ĉiu familio jam atingis 2,500 juanojn. La komunumo havas 161 familiojn, sed 169 teksilojn kaj nun ĉiuj familioj rekomencis teksadon de lana ŝtofo.

Poste ni venis al Zedang-komunumo de Nedong-gubernio. Sur la tabelo de ŝia jarfina distribuo troviĝas kelke da okulfrapaj ciferoj: En 1980 la grenprodukto atingis 1.55 milionoj da kg. — duoblo de tiu en 1979; la enspezo de la flankaj okupo atingis 370,000 juanojn, je 37% pli multe ol tiu en 1979; kaj la enspezo de brutobredado pliiĝis je 9%. La produktaĉmentoj memvole vendis al la ŝtato 0.5 milionon da kg. da greno, preskaŭ duoble kiom tiu en 1979. La komunumanoj meznombre enspezis po 339.2 juanojn, je 155.7 juanoj pli multe ol en 1979. Ĉiu persono ricevis 375 kg. da greno, je 80 kg. pli multe ol en 1979.

La sekretario de la komunuma partia filio diris al ni, ke antaŭ 1980 oni permesis nur

grenan produktadon kaj malpermesis ĉiujn aliajn okupojn. Sed nun la registaro malseverigis la politikon, tial la popolamasoj ekhavis altan entuziasmon al produktado, ĉiuj produktoj prosperiĝis kaj la enspezo de la komunumanoj plimultiĝis. En la lasta jaro ili faris agrikulturan produktadon laŭ siaj lokaj kondiĉoj kaj restarigis multajn tradiciajn entreprenojn. Nun la komunumo entreprenas restaŭradon, hotelon, stebadon, ŝuriparon, pramadon, fiŝadon, fruktoĝardenadon, akvomuelejon, teksadon de lana ŝtofo, transporton, prilaboron de feraĵoj kaj lignaĵoj, bredadon de laktobovinoj k. a. En 1980 la enspezo de flankaj okupoj plimultiĝis je pli ol 100,000 juanoj kompare kun tiu de 1979.

En Liemai-komunumo de Lhunze-gubernio ni vidis vicojn kaj vicojn da novaj loĝdomoj. La vicsekretario de la komunuma partia filio diris al ni, ke ili

jam konstruis 128 novajn ĉambrojn por 39 familioj kaj ili planis havigi al la ceteraj familioj novajn domojn en 5 jaroj. Ni vizitis Gesang, komunumanon de la tria produkta taĉmento. Ĉe nia eniro li estis kudranta veston kaj lia edzino teksanta lanan ŝtofon. Ekvidinte nin, ili tuj ĉesigis sian laboron kaj proponis al ni teon. Ili diris, ke ilia familio havas sep membrojn, el kiuj kvar laboras. En la antaŭaj jaroj ili ŝvitlaboradis sur kampoj, tamen ilia vivo estis ne tiel bona. Sed en 1980 ili aĉetis 1 stebilon, 1 lanan, 3 tibetajn kaj 1 vatitan litkovrilojn, 8 tibetajn lanŝtofajn vestojn kaj aliajn kaptunajn vestojn kaj krome havis kontantan monon de pli ol 100 juanoj.

Kiam ni estis forlasontaj Shannan, tiu taĉmento estis okupita de jarfina distribuo. Troviĝis multaj deponantoj en la banko kaj aĉetantoj en la vendejo.

## Novaj aferoj en mia hejmloko

de MA NUOJUN

Antaŭ nelonge mi revenis al mia naskoloko Hebei-provinco por viziti miajn familianojn kaj vidis la ĝojon de la kamparanoj estigitan de la nuna kampara ekonomia politiko de la Partio. Mia tria frato, kiu antaŭe ĉiam plendis pri sia malriĉeco, ekridetis kaj komencis rakonti al mi pri sia bona vivo. Tio por mi estis nova afero!

Tuj post mia alveno, li buĉis kokon kaj kapron kaj aĉetis vinon kaj legomojn por regali min, kvazaŭ en islama festo de fast-

rompo. Dum ilia preparado de manĝaĵoj mi rigardis iliajn ĉambrojn kaj trovis la grentenejon plena de milio kaj tritiko. Vestoŝranko kun granda spegulo, komodo kaj aliaj mebloj raraj en la pasinteco jam staris po unu en la ĉambroj de mia frato kaj mia nevo. Krome ili havas unu kudromaŝinon kaj du biciklojn. En la stalo kaproj hufobatis kaj en la korto kokinoj klukadis. Vere prospera sceno!

(Daŭrigota sur p. 36)

# Vizito al foiroj de Beijing

**D**ENOVE ekfunkciis la foiroj fermitaj antaŭ pli ol 10 jaroj en ĉinaj urboj kaj urbetoj.

Ekde la fino de 1978 Beijing sinsekve starigis 41 foirojn en la kvartaloj kaj ĉirkaŭ grandaj fabrikoj kaj minejoj, kio ricevis aprobon de la kamparanoj kaj urbanoj. Tie, oni povas aĉeti agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn, kiujn la ŝtataj firmoj malmulte aŭ tute ne vendas.

Iun fruan matenon, mi venis al la Hongqiao-a Foiro de Chongwen-distrikto. Ambaŭflanke de la strato Ciqikou longa 0.5 kilometron staris multaj tegmentitaj vendotabloj unu apud alia, la vico de la bonorde vicigitaj vendejoj kaj kaĝoj por kokoj kaj anasoj estis longa je 400 metroj.

Je la apero de aŭroro, tie kolektiĝis kamparanoj de la proksimaj antaŭurboj kaj klientoj el la ĉirkaŭaĵo. Apenaŭ mi venis al la enirejo, mi ekflaris la bonodorojn de rostitaj kaŝtanoj kaj batatoj. Moviĝante kun la homfluo mi trarigardis la foiron. La bretoj estis plene ŝarĝitaj per legomoj, fiŝoj, salikokoj, ovoj, grenoj, arakidoj, akvomelona kaj sunflora semo ktp. En kaĝoj estis kokoj kaj anasoj kaj en la viandvendejoj pendis porkaĵo aŭ bovaĵo kaj ŝafajo.

Laŭ tabuloj kun sloganoj

“Zorgu la higiecon de la foiro!” kaj “Ne krii!” ktp. mi venis antaŭ la lignan domon de la foira administrejo kaj vidis norman pesilon por uzo de aĉetantoj. Sur apuda muro estis “Referenca Prezotabelo de Agrikulturaj kaj Flankokupaj Produktaĵoj”. Kvankam estis frosta vintro, tamen la prezo de iuj varoj montrita sur la tabelo ne estis alta. Unu kilogramo da celerio kostis 0.4-0.5 juanon, unu kg. da testudo ĉ. 4 juanojn, unu kg. da bovaĵo ĉ. 2.4 juanojn . . . Kiam fremdlandano informiĝis, ke en vintro 1 kilogramo da spinaco kostis nur 0.30 dolaron li pretervole diris al la

vendinto: “Via prezo estas racia.”

En la homamaso estis mezaĝa virino, kiu portis grandan kokinon unumane kaj korbon kun bovaĵo kaj tomatoj ktp alimane. En babilado ŝi diris al mi: “Mi foruzis nur duon-horon ĉimatene por la aĉetado. Kiel oportune!”

Mi vizitis maljunan Wang, respondeculon de la administrejo de la foiro. Li diris, ke la foiroj estas multe laŭdataj de la amasoj. Foje, graveda virino volis manĝi frititan ŝafstomakon. Ŝia edzo vizitis multajn ŝafaj-vendejojn, sed ne akiris

*Foiro en Baiwanzhuang*







*Stando de panoj  
kaj jujuboj*

ĝin. Poste, li preterpasis la foiron kaj trovis kampanon vendanta ŝafstomakojn, do li ĝoje aĉetis unu. Maljuna Wang ankaŭ diris al mi, ke, ĉar tiu foiro abundas je agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, ankaŭ aĉetistoj de iuj famaj restoracioj de Beijing kiaj Xinqiao kaj Hongbinlou ofte vizitas ĝin por aĉeti testudojn, fungojn, orelfungojn, delikatan ŝafajon kaj spicaĵojn por prepari brog-ŝafajon. Ankaŭ iuj manĝaj-magazenoj pogrande aĉetis ternuksojn kaj sezam-oleon, pere de la administratejo.

Dum nia interparolado, en la foiron veturis manĝaj-venda aŭto de ŝtata magazeno. Matrike kaj vespere ĝi speciale venas por vendi panojn kaj etmanĝaĵojn al la kampanoj kaj standvendistoj laŭ peto de la foiro.

### **ADMINISTRADO KAJ KONCERNAJ POLITIKOJ**

En la dua tago mi vizitis alian grandan foiron de Beijing — la Beitaipingzhuang-an Foiron de Agrikulturaj Produktaĵoj. Tie troviĝas tri grandaj varvendaj budoj kun 240 vendbretoj, 44 kokaj kaj anasaj kaĝoj kaj fiŝ-

basenoj. Por bone teni la purecon de la foiro, la administratejo de la foiro speciale dungis purigistojn. Por la kampanoj, la administracio aranĝis manĝejojn kaj loĝejojn kun 700 litoj, kiuj povas ilin servi malmultekoste.

Bai Xichun, oficisto de la administratejo de la foiro, diris al mi: “Kiel en aliaj foiroj la kampanoj ĉe ni devas doni administran pagon laŭ la venditaj kvantoj de siaj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. Se la negoca monsumo ne superis 30 juanojn, la vendinto devas pagi 0.3 juanon; se ĝi superis 30 juanojn, li devas pagi 2% de la ricevita mono. Por teni la purecon de la foiro, ni ankaŭ kolektas certan higienan garantian monon.” Li diris, ke en 1980 la foiro kolektis administran pagon de pli ol 90,000 juanoj. Tiu monsumo preskaŭ tute uzigis por konstruado de la foiro kaj salajrado al la purigistoj.

Kamarado Bai retrorigardis la staton de la foiro en la komenco de la starigo. Tiam la specoj de la varoj estis limigitaj, ekz. disvendo de la grenoj kaj

oleoj aĉetataj nur de la ŝtato estis malpermesata en la foiroj. Nun, escepte de kotono kaj kruda silko ĉiuj agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, kiel grenoj, oleoj kaj aliaj antaŭe monopoligitaj de la ŝtato, povas esti vendataj en la foiroj, post kiam oni plenumis la taskon vendi difinitan kvanton da tiaj produktaĵoj al la ŝtato.

Krome, post ricevo de la sankcio de la administratejo de industrio kaj komerco, ankaŭ kolportistoj povas fari komercadon en la foiroj. Kamarado Bai diris, ke plejparto de la nun vendataj ŝenoprazoj en la foiroj estas alportita de kampanoj de Baoding-subprovinco de Hebeiprovinco. La transportado estas tre peniga, tial certa profito por la kolportistoj estas racia.

Kiam mi promenis en la foiro de Beitaipingzhuang, mi vidis, sur vendobretoj, nigran orelfungon de Heilongjiang, haran legomon de la Interna Mongolio kaj narcisojn de Fujian . . .

Oficistoj de la administratejo de la foiro diris al mi, ke ili havas certan limigon al kolportado. La ŝtata leĝo malpermesas

eksploatadon per dungado, spekuladon, transvendadon de ĉiaj aĉetaĵoj, pogranda aĉetadon de ŝtataj varoj por poste detale vendi ilin por gajni profitegon. La leĝomalobservantoj devas esti punitaj, la malgravaj leĝomalobservantoj devas esti kritikataj aŭ punitaj je mono kaj la gravaj leĝomalobservantoj peze punitaj laŭleĝe. Foje, oficisto de la foira administrado trovis, ke iu kolportisto metis pecon de magneto en la pesilon, li konfiskis lian pesilon. Alia kolportisto estis tie vendanta barelon da mortintaj kraboj. La profilaktika stacio tion rimarkis, kaj konfiskis kaj neniigis ilin.

### HELPANTO DE LA ŜTATA KOMERCO

Ekde la malfermiĝo de la foiroj de Beijing la komerco estis tre prospera. En 1980, en la 41 foiroj vendiĝis 229 specoj de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. La venditaj legomoj, sekaj kaj freŝaj fruktoj kaj akvoproduktaĵoj pliiĝis respektive 3-oble, 5-oble kaj 6-oble kompare kun 1979. Kvanto de la bovajo kaj ŝafajo venditaj en la foiroj atingis pli ol 1,000 tunojn.

En la 14-a de januaro ĉijare, la Administra Buroo de Industrio kaj Komerco de Beijing faris enketon. Tiutage neĝetis, la komercado de la foiroj tamen ankoraŭ daŭris. En la 41 foiroj negocis 10,000 kamparanoj kaj kolportistoj. La Hongqiao-a Foiro havis 390 standojn. Ekde la kuranta jaro, meznombre ĉiutage 700 kamparanoj kaj kolportistoj venas tien por fari komercadon, ilia maksimuma nombro iam atingis 1,200. La Beitai-pingzhuang-a Foiro havas nur 31 3-etaĝajn kokokaĝojn. Tamen



*Stando de viando*

*Avino aĉetas kokon.*



en la Novjara Tago de 1981 per ili oni vendis pli ol 2,000 kokojn. La prosperaj foiroj ludis bonan rolon en plenumo de la bezonoj de la urbanoj, en reguligo kaj plibonigo de la ŝtata provizado de la flankokupaj manĝaĵoj.

En la lastaj jaroj, multe disvolviĝis la agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj, la prezoj de la produktaĵoj estis stabilaj kaj iuj el ili eĉ malleviĝis.

La prezoj de 11 el la 14 specoj de ĉefaj produktaĵoj kiel ternuksoj, sunfloraj semoj, tabako, kokovoj, vivaj kokoj, ŝenoprazoj kaj aliaj estis stabilaj aŭ iom malleviĝis. Kompare kun tiuj de la ŝtataj vendejoj, la prezoj de la bovajo, ŝafajo kaj vivaj kokoj estis pli altaj po kg. je 0.4 aŭ 0.6 juano kaj tiu de ternuksoj eĉ malpli alta je 0.10 ĝis 0.20 juano.



# Jugdecido de la popolo


de REN XINLE



*Jiang Hua voĉlegas la Verdikton de la Speciala Tribunalo de la Supera Popola Kortumo de la Ĉina Popola Respubliko.*

**P**OR la ĉina popolo la 25-a de januaro de 1981 estis tago kun historia signifo. En tiu tago la Speciala Tribunalo de la Supera Popola Kortumo de la Ĉina Popola Respubliko deklaris la finan verdikton pri la dek ĉefaj krimuloj de la kontraŭrevoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing.

Post kiam la tribunalo estis malfermita en la 20-a de novembro lastjare, ĝi okazigis, dum





procesado de 67 tagoj, sume 42 sesiojn por esplorado kaj debato pri la krimoj, en kiuj 49 atestantoj kaj persekutitoj faris atestojn kaj 873 pecoj de atestoj estis ekzamenitaj. Granda nombro da materiaj kaj skribaj atestoj, ekspertizaj konkludoj, vortoj de atestantoj kaj plendoj de la persekutitoj plene montris, ke la krimoj de la dek ĉefaj krimuloj de la kontraŭrevoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing estas klaraj, efektivaj kaj konfirmitaj. Plejparto de la dek krimuloj, escepte de la obstinaj Jiang Qing kaj Zhang Chunqiao, faris konfesion pri siaj krimoj konforme al la faktoj.

Je la naŭa horo a.t.m. la tribunalo deklaris sian malfermiĝon. Jiang Qing kaj aliaj naŭ ĉefaj krimuloj estis eskortitaj al la sidlokoj por akuzitoj. Ĉe tio regis en la tribunalo serioza atmosfero.

Eksonis laŭta kaj serioza voĉo.

La prezidanto de la kortumo Jiang Hua legis la verdikton:

“La tribunalo konfirmas, ke la kontraŭrevolucia kliko kun Lin Biao kiel sia ĉefo kaj la kontraŭrevolucia kliko kun Jiang Qing kiel sia ĉefo ambaŭ estas kontraŭrevoluciaj klikoj, kiuj faris konspirajn aktivadojn kun la celo kapti la superajn potencojn de la Partio kaj la ŝtato...”

Tio ĉi estis la konkludo de la popolo kaj ankaŭ de la historio. La justa voĉo sonis tra la halo de la tribunalo kaj disaŭdiĝis en ĉiuj partoj de Ĉinio.

“La krimaj aktivadoj de la kontraŭrevoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing daŭris dek jarojn, portante katastrofojn al ĉiuj laborkampoj kaj ĉiuj regionoj de la lando, multe damaĝante la sistemon de la popol-demokratia diktaturo kaj la socialisman sociordon de nia lando, serioze detruante la nacian

ekonomion kaj ĉiujn aliajn entreprenojn, kaj kaŭzante grandegajn suferojn al la diversnaciecaj popoloj . . .”

Ĉiuj liaj vortoj plene montras sangon kaj larmojn de la persekutitoj kaj profundajn vundojn de Ĉinio!

Por la ĉina popolo, tiuj, kiuj staris antaŭ la tribunalo en tiu momento, ne estis ordinaraj krimuloj. Ili reprezentis la malordan epokon kaj herezajn fortojn malhelpantajn antaŭeniron de la historio.

Fine venis la tempo, kiam la tribunalo serioze deklaris la verdikton pri ili:

Jiang Qing estis kondamnita al morto kun dujara vivindulgo kaj dumviva senigo de politikaj rajtoj.


Zhang Chunqiao estis kondamnita al morto kun dujara vivindulgo kaj dumviva senigo de politikaj rajtoj.

La aliaj akuzitoj Yao Wen-yuan, Wang Hongwen, Chen Boda, Huang Yongsheng, Wu Faxian, Li Zuopeng, Qiu Huizuo kaj Jiang Tengjiao estis kondamnitaj respektive al dumviva mallibereco aŭ mallibereco de limigita tempo.

Tio ĉi estis juĝdecido de la popolo kaj de la historio.

Finfine la kontraŭrevoluciaj klikoj de Lin Biao kaj Jiang Qing, kiuj intrigis por renversi la socialisman sistemon, estis punitaj kaj de la historio kaj de la socialisma leĝo.

La ĉeestantoj, kiuj sidis sur la lokoj por vizitantoj senescepte ĝojiĝis, vidante ilian hontindan finiĝon. Tuj aŭdiĝis tra la halotondra aplaŭdado. Ili manpremis unu kun alia por celebri tiun ekstreman momenton.



*Jiang Qing, Zhang Chunqiao kaj la ok aliaj ĉefkrimuloj atendas kondamnon.*



*Junulino plenigas formularon ĉe svatagentejo.*

**E**N iu vintra vespero, ĉirkaŭ la altaro de la parko Ritan de Beijing krakantaj kampfajroj lumigis la ĉielon. Tie okazis kampfajra vespero aranĝita de la svatagentejo de Chaoyang-distrikto por gejunuloj. Ĉ. mil gejunuloj nekonataj unu al alia ĝoje venis ĉi tien por elekti sian amaton. En la komenco ili estis iom hontemaj, sed post ne-longe kuraĝaj junuloj ekparolis kun knabinoj. Sekve de tio pli kaj pli da gejunuloj kontaktiĝis kaj interparolis. Iuj el ili ne nur elektis amaton por si mem, sed ankaŭ donis helpon al sia amiko.

En la lasta tempo svatagentejoj aperis en multaj urboj de Ĉinio. Nun sole en Beijing ja funkcias 5 tiaj agentejoj. Kial Ĉinio bezonas tiajn profesiajn svatagentejojn en la nuntempo? Certe estas multaj kaŭzoj. Unue, mankis al gejunuloj ŝancoj por kontaktiĝo unu kun alia en la ĥaosaj jaroj de kultura revolucio. Due, parto de la intelektaj gejunuloj, kiuj laboris en kamparo kaj ne volis edziĝi tie,

revenis al la urbo. Kaj trie, iuj gejunuloj kiuj sin okupas per laboroj “malestimataj” de nombro da personoj, renkontas multajn malfacilojn en elektado de amato. Ĝuste pro tio la svatagentejoj estas bonvenigataj de la gejunuloj.

La svatagentejo de Chaoyang-distrikto fondiĝis en la lasta septembro sub la aŭspicioj de la Komunisma Junulara Ligo kaj la Virina Federacio de la distrikto.

Ĝi tiel laboras: ĉiu svatiĝanto prezentas du fotojn de la lasta tempo kaj pagas iom da mono por svatado kaj plenigas enketan formulon pri si kaj sia familio kaj siaj kondiĉoj en elektado de fianĉo (aŭ fianĉino). Poste la svatantoj faras elekton el la posedataj arkivoj kaj petas opiniojn de ambaŭ flankoj. Se ili konsentas renkontiĝon, oni do faras aranĝon por tio.

La unuafoja intervidiĝo estas tre grava. Kiam la svatanto kunigis la svatiĝantojn, plej ofte iliaj rigardoj renkontiĝas samtempe kaj en la palpebruma

# Por ke pli fariĝu fe

— Vizito al la Chaoyang-a

daŭro formoviĝas konfuzite. Ankaŭ troviĝas iuj fraŭlinoj kiuj mallevas sian kapon kaj ne kuraĝas rigardi la junulon. Post la interkoniĝo, la gefraŭloj iras pare al trankvila loko de la parko. Se ili kontentiĝas pri la unua renkontiĝo, ili daŭre kontaktiĝos laŭ mem difinitaj tempo kaj loko. Certe ne ĉiuj paroj sentas kontenton. Se tio okazas, ili informas la svatagentejon kaj atendas estontan ŝancon. Se iu malsukcesas tri fojojn, li do devas denove pagi saman sumon da mono por alia svatado.

La svatagentejo laboras posttagmeze de ĉiu merkredo kaj dimanĉo. Foje mi faris intervjuon ĉe la svatagentejo. De malproksime mi vidis, ke ĉe la pordo kolektiĝas multaj gejunuloj. Iuj legas la regularon sur la muro kaj aliaj atendas sian vicon por registri. La registrejo por knabinoj lastatempe translokiĝis al alia domo pro tro multaj rigardantoj.

“Kiam vi havigos al ni rendevuon?”

“Ĉu vi povas teni tion en sekreto por ni?”

“Ĉu. . . .”

Apenaŭ mi suriris la ŝtuparon, mi aŭdis la knabinan ridklukon kaj ilian demandadon.

# da gejunuloj

## ĉaj paroj


Svatagentejo de Beijing

de HONG YING

Mi alpaŝis al la laborantoj kaj vidis multajn fotojn de la knabinoj. La fotoj estas serioze elektitaj, plejparte el ili aspektas bele. Sed iu knabino en la foto aspektas malpli bela ol ŝi fakte estas. Ŝi estas 28-jara vartistino. Mi demandis ŝin, kial ŝi alvenis ĉi tien. Ŝi respondis: “Mi laboras en infanĝardeno kaj havas malmultajn ŝancojn por kontaktiĝi kun aliaj personoj. Mia temperamento estas iom stranga, tial ĝis nun mi ne trovis taŭgan amaton. Mi pensas, ke la svatagentejo povas prezenti pli multe da elektoj ol parencoj. Kaj krome, mi ne devas rekompenci al la svatanto.” Mi vidis, ke ŝi skribas en la formulo: “Mi volas ke li estu persono lernema, diligenta en la laboro, honesta kaj sana. Estas pli bone, se li sin okupas per kultura aŭ eduka laboro.” Skribinte tion, ŝi haltis, pripensis momenton kaj aldonis: “Estas pli bone, ke lia ekonomia ŝarĝo estas ne tro peza, sed en tiu flanko mi ne estas postulema.”

Laborantino Shi de la svatagentejo diris al mi, ke nun la postuloj de la junuloj estas relative realismaj: la amatino devas esti bela, kapabla por dommastrumado, havis konstantan okupon kaj relative bonajn familiajn kondiĉojn. Koncerne la

*Svatagentejo aranĝis por ili intervidiĝon.*



fraŭlinojn, ili esperas ke la fianĉo devas esti honesta, serioza en laboro kaj havi fakan scion. “Tio estas bona fenomeno,” ŝi daŭrigis, “sed ankaŭ troviĝas iuj junulinoj, kiuj postulas nur riĉecon kaj altan rangon de la fianĉo.”

Tie min trafis jena okazaĵo: paro da gejunuloj ĝoje venis ĉi tien en la difinita tempo, sed tuj ĉe la renkontiĝo lin kaptis mal-espero. Ĉar la fraŭlino estas jam 28-jara, sed ŝia foto sur la registrofolio estis farita antaŭ dek jaroj. Ŝi forgesis ke kun la tempopaso jam forvelkiĝis ŝia knabina beleco. Ne senkaŭze la fraŭlo sin turnis for tuj ĉe la renkontiĝo.

Laboranto de la svatagentejo rakontis al mi alian interesan aferon. En la registrolibro troviĝas foto de junulo kun okul-

vitroj, kaj sube de ĝi li faris specialan noton: “Mi estas altgrade miopa.” Kiu povas imagi, ke iu fraŭlino tamen lin elektis. Ŝi diris: “La miopeco estas ne grava. La noto ja montras lian malkaŝemon. Tial, vivi kun tia homo certe estos feliĉe.”

Dank’ al la helpo de la svatagentejo multaj gejunuloj efektiviĝis sian deziron. Esploranto-studento Li estas unu el tiaj ekzemploj. Li altas je 1.75 m. kaj aspektas sufiĉe bela. En pasinteco li esperis, ke lia amatino devas esti kaj bone edukita kaj bela, krome, ŝi devas alti je pli ol 1.65 m. kaj aĝi je malpli ol 24 jaroj. Liaj parencoj kaj amikoj svatis por li kelkajn knabinojn, sed neniu el ili plaĉis al li. Nun li jam estas 29-jara, kaj ankaŭ li alvenis al la svatagentejo por peti helpon. Iuj avertis




lin ke, tiuj, kiuj petas helpo de la svatagentejo, certe estas personoj kun malbonaj kondiĉoj, pro kio ne troveblas lia dezirinda amatino. Sed post hezito li venis al la svatagentejo por trovi bonŝancon.

Por plej rapide kontentigi lian postulon, oni elektis por li amatinon laŭ aĝo, profesio kaj familiaj kondiĉoj. Kaj fine ili sukcesis en la elektado. Ŝi estas dignaspekta kaj bela. Post diplomitiĝo en supera mezlernejo ŝi memlernis fremdan lingvon kaj nun laboras en redakcio de iu ĵurnalo. Tuj en la unua renkontiĝo, ili enamiĝis unu al la alia. Nun ili estas en arda amo. Li diris: "Se nia geedziĝo sukcesos, unue mi regalos la svatantojn per bombonoj."

Dank' al la klopodo de la svatagentejo, 700 gejunuloj nun estas en kontaktiĝo, kaj 3,000 gejunuloj estas en atendado por ricevi amaton (aŭ amatinon). Ĉe la svatagentejo mi foliumis registrolibron kaj faris detalan enketon. Inter tiuj registritoj estas gelaboristoj, geinstruistoj, geoficistoj, geteknikistoj, medicinaj gelaborantoj, gekuiristoj, geveturigistoj k.a. Mi deziras ke ili ĉiuj sukcesu en elektado de sia amato (amatino).



## LOKOJ MENCIIATAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Gezhouba (en Hubei-provinco)
2. Mogan-montaro (en Zhejiang-provinco)
3. Tibeto
4. Shandong
5. Sichuan

★ Beijing

**SUR NIA LIBROBRETO** 

### Guto post guto

**GUTARO** de Avoto (Aleksandro W. Thomson), 14 × 20 cm., 64 p. eldonis Esperanto Editions (adr.: 74 Saxon Road, Hastings, East Sussex, Anglio; ĝiro n-ro 34 768 7202). Prezo: sendotaj nur per pakajoj de 5 ekz. po £ 1.20, 9 ekz. po £ 1.10 kaj 20 ekz. po £ 1.00 por ŝpari la altan afrankon.

Tiu ĉi kolekto de 34 poemoj kaj 16-paĝa postskribo kovras 60-jaran periodon de la verkado de Avoto. Legante la versaĵojn mi rimarkis, ke nia aĝa pioniro skribis ne nur kun ĉiam pli granda artismo sed ankaŭ kun ĉiam pli granda entuziasmo — 10 el la 34 poemoj estis verkitaj en la jaro 1966, kiam li estis 70-jara! Li prenis por si diversajn temojn el la vivo: amo, amikeco, libereco, admiro al pioniroj, prizorgo pri infanoj, admono al diligentado kaj ankaŭ mito kaj sprito. "Mi mem ne

pretendas grandan poetan talenton," proklamis Avoto. Tamen li donis vere utilajn rimarkigojn en sia postskribo pri la poezia arto, precipe pri la formo de soneto, pri kiu li donis plurajn ekzemplojn. Troviĝas en la kolekto ankaŭ du tradukaĵoj, unu el kiuj estas "Sago kaj Kanto" de Longfellow, kies alia versio fare de Grabowski troviĝas en la Fundamenta Krestomatio.

Kial la poemaro portas la titolon "Gutaro"? La aŭtoro citis, sur la titol-paĝo, la famajn versojn pri "guto malgranda" el "La Vojo" de Zamenhof. Do la "Gutaro" celas la finan venkon de Esperanto. Gutaro ordinara tamen bonfara. Legante Avoton mi sentas, kvazaŭ mi sidus ĉe roĝo, kiu ĉarmas per kristala klaro kaj milda muziko.

Recenzis V. K.




## Torento de Changjiang- rivero Barita ĉe Gezhouba

La akvoellasa kluzo de la Dua Rivero ĉe Gezhouba. Tiu 27-porda kluzo povas ellasi 80,000 kubmetrojn da akvo ĉiusekunde.


Estis konstruita la Gezhouba-a konstruaĵo por bari Changjiang (Jangzi)-riveron, la plej longan riveron de Ĉinio. Ĝi konsistas ĉefe el du hidroelektrejoj kun totala generatora kapacito de 2,715,000 kilovattoj laŭ projekto, kiuj donos 13.8 miliardojn da kilovathoroj da elektro jare.

Gezhouba situas ĉe la elirejo de Xiling-gorĝo, unu el la Tri Gorĝoj de Changjiang-rivero, tie jam starigis 1 elektrejo, 1 akvoellasa kluzo, 2 ŝip-kluzoj kaj 1 kluzo por forlavi sablon. En tiu ĉi jaro la konstruaĵo povos esti transdonita al uzado.


Breĉoŝtopado ĉe Gezhouba







Laboristoj instalas ekipaĵon.





Specialisto kontrolas la barajan fundamenton de la konstruaĵo.





La ĉefa parto de la  
Gezhouba-a konstruaĵo


Oni provas pordon de la ŝip-kluzo n-ro 2 de la konstruaĵo. La pordo 19.7 metrojn larĝa kaj 34 metrojn alta estas unu el la plej grandaj ŝip-kluzoj en la mondo.





## Velado sur glacio

En la tempo, kiam glaciĝas Songhua-rivero de nordorienta Ĉinio, Harbin-anoj iras tien kun velsletoj. La velsletoj glitas helpate de vento.



## Subtera Kanalo

En Turpan-regiono de Xinjiang la klimato estas seka kaj la tero sabloza. La pluvo kaj degelinta neĝo penetras sub la teron. Por utiligi la akvon, la tieaj loĝantoj fosas subteran kanalon kaj kondukas ĝin sur teron. Tiamaniere la akvo fluas senhalte al la oazo de la dezerto.



# Naskiĝo de novaj civitanoj

**L**A nomita hospitalo situanta en la Orienta Kvartalo de Beijing (Pekino) estas multe konfidata de loĝantoj. Antaŭe ĝi estis dependa obstetrika hospitalo de la Ŝtata Unua Akuŝlernejo, fondita de fama obstetrika specialistino Yang Chongrui en 1929. Nemalmultaj el la de ĝi elkulturitaj lernantinoj fariĝis ĉefaj akuŝistinoj. Dum la lasta jaro tiu hospitalo faris sanprotektan laboron de la puerpera periodo kaj akiris sukceson en protektado de patrinoj kaj beboj. Lastatempe mi vizitis tiun hospitalon por intervjuo.

## VORTOJ DE MALJUNA HOSPITALESTRINO

La hospitalestrino Wen Lianqing diplomitiĝis el la akuŝlernejo kaj komencis labori en la hospitalo en la 40-aj jaroj. Multaj el ŝiaj koleginoj, kiaj estrino de la ginekologia-obstetrika sekcio, respondeculino de la sanprotekta fako kaj aliaj, estis ŝiaj malnovaj kunlernantinoj. Ŝi diris, ke la malnova Ĉinio havis tre postĝintan obstetrikon kaj tre malmultajn obstetrikajn kuracistinojn kaj akuŝistinojn, kaj krome, ili laboris en urboj. Kaj en la vasta kamparo prizorgis la akuŝon nur akuŝistinoj netrejnitaĵ. Neniu sciis, kiom

da virinoj kaj beboj mortis de puerpera febro aŭ tetano. Tial la tiamaj virinoj rigardis la akuŝon kiel mortodanĝeron. En la komenca periodo post la Liberiĝo la popola registaro disvastigis la novan akuŝigan metodon tra la tuta lando, kio garantiis la sanon de la akuŝintinoj kaj beboj. En la lastaj jaroj la mondaj medicinistaj rondoj donis ĉiam pli grandan atenton al la sanprotektado de virinoj en ilia graveda periodo kaj la nova medicino pri puerpereco ricevis disvolviĝon. Ankaŭ en multaj lokoj de nia lando oni komencis sanprotektan laboron por virinoj en puerpereco. La hospitalo komencis tiun laboron en la komenco de 1980 kaj akuŝigis 4,968 bebojn en la lasta jaro, kies mortoproporcio estis sub 0.9%.

Mi informiĝis de ŝi ankaŭ, ke ilia hospitalo estas mezgranda kun 240 laborantinoj kaj 104 litoj, el kiuj 64 estas por la obstetrika sekcio. Krome, ĝi havas du beboĉambrojn kun 64 litoj kaj tie laboras du pediatrioj. Ke ĉiuj laborantoj de la hospitalo estas virinoj, tion aprobis precipe gravedulinoj kaj akuŝantinoj.

Poste, akompanate de klinik-estriko Wu, mi pririgardis la ripozĉambrojn por akuŝintinoj,

la beboĉambrojn, la obstetrikon klinikon kaj la ultrason-kontrolan ĉambron. Kvankam la hospitalo estas nemodernigita, tamen ĝia medio estas tre pura kaj la laboro en bona ordo. Tio, kio impresis min profunde, estas ilia devokonscieco. Ili ĉiuj honeste laboras por naskiĝo de novaj civitanoj.

## PROTEKTADO DE "SPECIA- LAJ CIVITANOJ" ANTAŬ ILIA NASKIĜO

Nova vivo komenciĝas tuj post gravediĝo de virino. La kreskado de la embrio influas rekte la estontecon de la nova vivo. Nun nia lando praktikas laŭplanan naskadon kaj alvokas, ke ĉiu geedza paro nasku nur unu bebon, tial estas aparte grave bone protekti la estontajn civitanojn.

Respondeculino de la sanprotekta fako Liu Shuyu diris al mi, ke ĝenerale la ampleksaj hospitaloj starigis sanprotektan fakon. Nia obstetrika sekcio respondecas pri la sanprotekto de gravedulinoj, akuŝintinoj kaj novnaskitoj de 11 loĝkvartaloj kun 28,000 homoj, el kiuj pli ol 4,000 estas naskopovaj virinoj. Kaj krome ni respondecas ankaŭ pri sanprotekto de la salajruloj de proksimaj fabrikoj, institu-



*Estrino de la obstetrika sekcio ekzamenas gravedulinon.*

cioj kaj lernejoj en ilia puerpera periodo. Kompreneble, nia sekcio konsistanta el kelkaj personoj ne povas ĝustatempe koni la sanstaton de tiom multaj virinoj. En la bazaj unuoj ni havas multe da helpantoj, kiuj funkcias kiel sanitaristoj de la sanprotektaj servoj de la loĝkvartaloj kaj de la kuracejoj de fabrikoj, institucioj kaj lernejoj, plejparte trejnitaj kaj fervoraj en servado al la amasoj. Kiam ili informiĝas, ke iu naskopova virino ne sentis menstruan aŭ ekvomis pro gravediĝo, ili urĝas ŝin iri al la hospitalo por ekzameni; se ŝi ne venas pro okupiteco aŭ hontemo, do doktorinoj telefonas, skribas al ŝi leteron aŭ vizitas ŝin en ŝia hejmo por klarigi al ŝi la necesecon de ekzamenado. Ili starigis servon al la virinoj gravedaj de malpli ol tri monatoj por enketi detale pri ilia san-historio, pri tiu de iliaj edzoj kaj aliaj familianoj, kaj pri la historio de ilia nasko kaj misforma embrio de iliaj parencoj, por laŭeble eviti malbonan influon de geno al la embrio. Ili donas higienajn sciojn pri frutempa gravedeco al tiuj

virinoj, kiuj estas normale gravedaj, precipe pri prevento de aborto. Se ili trovas anormalan staton en ekzameno aŭ enketo, ili petas, ke la gravedulino iru al la modernigita Ĉefurba Hospitalo por amni-fluida ekzameno. Se la ekzameno montras, ke estas ne konvene por ŝi naski, ili konsilas, ke ŝi ĉesigu la gravedecon.

Kvin monatojn post la gravediĝo la virino devas sin turni al la obstetrika sekcio por ricevi periodan ekzamenadon. La sekcistrino iras al la fabrikoj, kie estas multaj laboristinoj, por fari regulan antaŭakuŝan ekzamenadon.

Tiuj gravedulinoj, kiuj aĝas pli ol 35 jarojn kaj estas unuafoje gravedaj, aŭ kiuj suferas de komplikajo de interna medicino, aŭ kiuj abortis en la pasinteco, aŭ kiuj havas feton en malĝusta pozicio, estas multe prizorgataj kaj ekzamenataj de sekcistrinoj kaj la ĉefkuracistino mem. La hospitalo preparis kartojn aparte por ilia ekzameno aŭ kuraco en antaŭdifinita tempo. Preskaŭ ĉiuj gravedulinoj bone kun-

agas kun la aranĝo. Sed ankaŭ okazis esceptoj. Ekz-e, iu gravedulino anemiigis je 22 semajnoj post la gravediĝo, sed ŝi ne akurate vizitis la hospitalon por ricevi ekzamenadon kaj kuracadon. La kuracistino do urĝis ŝin viziti la hospitalon per letero laŭ la adreso sur la karto. La ekzameno montris, ke ŝi malsanas jam grave je anemio, kaj ŝi estis restigita en la hospitalo por ricevi kuracilon. Ŝi sukcese naskis bebon kun pezo de 3.2 kg. Post 42 tagoj ŝi venis al la hospitalo por ekzamenado. Tiam ŝia sangokoloraĵo atingis la normon.

“Glutea pozicio” de feto ofte kaŭzas malfacilan akuŝon. Aplikante artemizian kaŭterizon, akuŝistinoj kuŝigas la gravedulinon sur ŝiaj genuoj kaj faras version en kunago de ŝia profunda spirado. Tiamaniere ili reĝustigas la pozicion de la feto. Laŭ statistiko 90.2% el 500 tiaj kazoj estis sukcese traktitaj.

37 semajnojn post sia gravediĝo oni devas ricevi ekspertizan ekzamenadon fare de la ĉefkuracistino kaj sekcistrinoj, kiuj detale kontrolas ĉiujn registrojn pri la gravedulino kaj ŝian gravedecon por antaŭvidi la akuŝan staton kaj bone fari preparon.

Ĉefkuracistino Shi Wenlan diris al mi, ke lastatempe ili faris diagramon por kontroli la procezon de akuŝo kaj atingis bonan efikon. Post kiam la akuŝantino eniras la akuŝĉambron, flegistinoj periode registras ĉiun procezon de la akuŝado sur la diagramo. Per tio ili ŝanĝas la abstraktajn registrojn en konkretan bildon por bone kontroli la akuŝan procezon. Kiam ili trovas la akuŝadon ĉesinta aŭ nenormala, ili ĝustatempe alpre-



nas rimedon. Tio pliigas la devosenton de la kuracistinoj. Nun 11 hospitaloj de Beijing alprenis la saman metodon, tiel reduktante la proporcion de akuŝesiĝo, la hemoragion de akuŝantino kaj la nombron de sufokitaj novnaskitoj.

### SAN-KARTO DE BEEO

Post kiam la bebo estas naskita, la hospitalo faras por ĝi san-karton, sur kiu estas registritaj ĝiaj staturo, korpopezo, sanstato, kuracado kaj vakcinado. Kiam la patrino kaj ŝia bebo forlasas la hospitalon, ili devas porti kun si la karton. Laŭ la reguloj de la hospitalo la kuracistino devas viziti la akuŝintinon trifoje ĝenerale: la unua dum 48 horoj, la dua dum la dua semajno kaj la tria dum la kvara semajno post ŝia forlaso de la hospitalo. Se al la akuŝantino aŭ al ŝia bebo okazas io eksterordinara, la familianoj povas informi tion kiam ajn al kuracistino de la sanprotekta fako por peti kuracon. Ĝenerale la patrino kaj bebo ne bezonas forlasi sian domon pro kuraco en la unua monato.

Iun decembran tagon en akompano de d-rino Chen, mi vizitis akuŝintinon en unu loĝdomo en la Ĉina Popola Universitato, kiun ŝi devis prizorgi. Frosta ventego blovis, tamen en la domo regis kvazaŭ printempo. La akuŝantino estis 28-jara servistino de restoracio, nomata Zheng Keying. Antaŭ 22 tagoj ŝi naskis filinon por la unua fojo. Tre ĝojis pro tio la tuta familio, precipe ŝia bopatrino. La lasta tre amzorgis siajn bofilinon kaj nepinon. D-rino Chen ekzamenis la bebon kaj trovis ĝian ventron iom ŝvela. Ŝi rigardis la fekajon kaj trovis, ke



*Vizito al akuŝantino kaj ŝia bebo*

*Flegistino prizorgas novnaskitojn.*






la bebo suferas de dispepsio. Ŝi diris al la avino, ke ŝi aldonu pli da riza supo al la bovlakto por nutri la bebon, kaj la lasta kapjesis. D-rino Chen levis la bebon kaj lerte banis ĝin per varmeta akvo. Tuj post la bano, la bebo endormiĝis dolĉe. Ŝi pesis ĝian korpopezon kaj trovis ke ĝi pliigis je 1.1 kg. ol ĉe la naskiĝo. La juna patrino ĝoje diris: "Tiu ĉi bebo certe povos kreski ĝis 4.5 kg. post 8 tagoj!" La d-rino kaj la patrino

kompreneme ekridis. La avino diris al mi: "D-rino Chen estas konscienca. Post kiam la patrino kaj bebo forlasis la hospitalon, ŝi faris tri vizitojn al ili. Kiel ni bedaŭras pro ĝeno al ŝi en tiel malvarma tago!" Adiaŭinte la avinon, ni iris al alia akuŝantino. Survoje mi informiĝis de ŝi, ke post la hejma kuracado de kvar semajnoj la karto transdoniĝos al la strata sanprotekta stacio kaj kun kreskado de la infano ĝi transdoni-

# KARIKATURO


Utileco de kurado

Pentritaj de XING ZIYUN



En plena absorbiĝo Pentritaj de CHEN LING

2 : 1 Pentrita de GUO DAGUANG



ĝos al infanvartejo, infanĝarde-  
no kaj lernejo.

Post la vizito ni revenis al la  
sanprotekta fako kaj vidis fo-  
tojn de beboj sub la vitroplato  
de la skribotablo de ĉiu kuracis-  
tino. Oni diris, ke ĉiuj tiuj be-  
boj naskiĝis en tiu hospitalo.  
Kiam mi rigardis iliajn amin-  
dajn vizaĝojn, kuracistinoj po-  
vis eldiri ilian malsaman san-  
staton. Estis bebo antaŭtempe  
naskita. Ĝi pezis je nur 1.1 kg.

ĉe sia naskiĝo. Dank' al la pri-  
zorgado de kuracistinoj kaj fle-  
gistinoj, ĝi forlasis la hospitalon  
post 40 tagoj. Estis iu akuŝin-  
tino de trinaskito, al ŝi okazis  
kolapso post la akuŝado. Kura-  
cistinoj tuj faris urĝan savon, ke  
ŝi rapide eldangiĝis kaj forla-  
sis la hospitalon post kelkaj ta-  
goj kune kun siaj beboj. Kiel  
ili povis ne danki tiujn, kiuj  
savis ilin en la kriza momento  
de la vivo! Ili sendis al la kura-

cistinoj la fotojn de siaj beboj  
ĝuste por esprimi sian koran  
dankon.

Je la fino de mia intervjuo  
mi diris al la hospitalestrino  
mian impreson. Ŝi diris: "La  
puerpera sanprotekta laboro  
estas ĵus komencita. Certe tro-  
viĝas multaj mankoj. Iuj nomis  
nian hospitalon konfidinda hos-  
pitalo. Ili troigis nian meriton,  
tamen donis kuraĝigojn por nia  
laboro."






# Perlo enterigita en dezerta monto

— Pri la ŝtonaj skulptaĵoj de Dazu

de CAO BAILONG

*Budhaj statuoj skulptitaj  
en supro de rokmuro*




**P**OST kiam budhismo estis enkondukita de Hindio en Ĉinion tra la Okcidentaj Regionoj (kiuj inkluzivas la nunan Xinjiang-an

Ujguran Aŭtonoman Regionon) en la unua jarcento p. K., la ŝtongravura arto multe disvolviĝis en Ĉinio. Mondfama estas la ŝtonka-

vena arto de Dunhuang en Gansu, de Datong en Shanxi kaj de Luoyang en Henan. Pro trafika ĝenado la ŝtonaj skulptaĵoj de Dazu en Sichuan ne estas konataj de la ekstera mondo. Nur en la kvardekaj jaroj de la dudeka jarcento ĉinaj historiistoj trovis notojn pri la ŝtonaj skulptaĵoj en iuj historiaj materialoj. Tiu grava malkovro skuis la tiaman artan rondon.

*Antikvaj konstruaĵoj en Baodingshan*



La ŝtonaj skulptaĵoj de Dazu aperis ekde Tang-dinastio (618-907 p. K.) antaŭ pli ol 1.000 jaroj. Tie troviĝas sume pli ol 50.000 ŝtonaj statuoj, kiuj dislokiĝas en pli ol 40 lokoj. Inter ili la skulptaĵoj estas koncentriĝe bone konservitaj en Beishan kaj Baodingshan. Ili estas plej belaj.

En la lastaj du jaroj, kun pliboniĝo de trafikaj kondiĉoj Dazu fariĝis turisma loko. Mi ekiris de

Chongqing (Ĉongking) nordokcidenten kaj atingis la gubernion Dazu post 4-hora veturado. Unue mi iris al Beishan, kiu sin trovas je du kilometroj nordokcidente de Dazu. Tiu loko kun multaj ŝtonaj montoj estas 650 metrojn alta super la marnivelo. La farado de la skulptaĵoj sur Beishan estis komencita en la jaro 892 p. K. kaj daŭris pli ol 250 jarojn. Mi ascendis supron de iu monteto laŭ ŝtona ŝtuparo. Tie troviĝas lunarka ŝtona kaverno kun multaj niĉoj, kiu etendiĝas je 0.5 kilometro en kiu troviĝas statuoj altaj kaj malaltaj, sidantaj kaj starantaj, ĉiuj estas plastikaj. Plej profunde min impresis la statuoj de bodisatvoj Manjusri kaj Samantabhadra. La unua rajdas sur obeema elefanto kaj la dua sur muĝanta leono. La du bodisatvoj — unu kun fortikeco, graseteco, serenececo kaj saĝeco kaj la alia kun tenececo kaj eleganteco montras sin bonkoraj kaj kvietaj, tamen ili rajdas sur feroĉaj bestoj. Tio formas filozofiajn figurojn pri venko de beleco kaj malforteco super feroceco kaj forteco kaj estigis efikon de unueco de senmoveco kaj moveco en arto.

Alia eleganta ŝtona skulptaĵo "Bodisatvo Avalokitesvara kun Rozario" staras meze en la ŝtona kaverno. Ŝi kun svelta staturo kaj delikata haŭto sin apogas sur ŝtonmuro. Ŝi portas florkronon sur la kapo, kaj tenas la manojn kruciĝantaj sur la abdomeno, kun kapo iom kliniĝanta antaŭen. Ŝi sin montras duonridetanta, tenera kaj intima. Evidente la artisto kreis la figuron de bela juna virino kaj oni nomas ĝin "Ĉarma Bodisatvo".

Tre valora estas la ŝtona skulptaĵo: Bodisatvo sur lotusa trono dorse portata de fluganta pavo.


Post rigardo de la ŝtonaj skulptaĵoj de Beishan, mi aŭte veturis je 15 kilometroj nordorienten kaj atingis Baodingshan. Ĝi estas ĉevalhufforma monto kun longeco de 500 metroj kaj alteco de 15-30 metroj. Sur la orienta, suda kaj norda rokmuroj kaj en la kaverno troviĝas sume 31 grandaj ŝtonaj skulptaĵoj. La skulptaĵoj de Baodingshan estis farigitaj de fama bonzo de Song-dinastio (960-1279 p. K.) kaj la farado daŭris 70 jarojn.

Veninte tien mi unue vidis statuan de la kuŝanta Ŝakjamunio. Ĝi

estas lia supra parto kun longeco de 31 metroj, kiu kovras la tutan orientan muron kaj ĝia kapo tuŝas la nordan muron. Ĝi impresas per grandiozececo. La skulptaĵo prezentas: La budho mortos kaj leviĝos al la paradizo kaj lin bonvenigas 9 feinoj en nuboj kun freŝaj floroj kaj fruktoj en la manoj. Antaŭ la budho grandega incensujo bonodore fumas ĝis la supro de la muro, kio faras la impreson kvazaŭ la fumo subtenas la rokplafonon. Tuj apud la kapo de la budho estas gravurita bildo pri la naskiĝo de Ŝakjamunio. Fonto elfluanta el buŝo de ŝtona drako lavas la jus naskitan bebon, kio prezentas la legendon ke naŭ drakoj lavas reĝidon en la budhisma sutro kaj montris la saĝecon de antikvaj ĉinaj metiistoj.

La ŝtonaj skulptaĵoj en Baodingshan elspiras fortan atmosferon de la socia vivo. Ekzemple skulptaĵo "Kokobredistino" montras belan junan kamparaninon, kiu kun rideto malfermas kaĝon. El la kaĝo unu koko etendas sian kapon por eliri kaj apud la kaĝo aliaj du kokoj konkuras pri lumbriko. Ŝia rigardo direktita antaŭen aludis, ke aliaj pluraj kokoj jam forkuris malproksimen por serĉi nutraĵon. La tuta

*La skulptaĵo "Virino Flutanta"*





bildo estas tre bela. Sed sur la rokmuro gravuriĝas jenaj vortoj: "kokobredistoj devas eniri la inferon", kio estas apokalipsa. Apude staras la kruelaj kaj malbelaj juĝistoj kaj diabloj de la infero, kio klare montris la amon kaj malamon de la skulptistoj.

Estas grupo de ŝtonaj skulptaĵoj kiuj reaperigis la flegadon de gepatroj al siaj gefiloj: Paro da geedzoj petas de la budho bebon, la edzin gravediĝas, akuŝas, mamnutras la bebon, lavas veston por la filo; la filo plenkreskas, edziĝas kaj forlasas hejmon kun ombrelo en la mano kaj la gepatroj edukas la filon. Ĝi montras la filecon en la antikva Ĉinio, kaj tiu, kiu ne obeis siajn gepatrojn, devis esti kondamnita al la infero. Apude videblas grupo de skulptaĵoj pri neobeemaj filoj punitaj al la infero.

Estas grupo de skulptaĵoj pri ebruloj, kiu konsistas el kvar bildoj. La skulptaĵoj koncize kaj vivece montras malsamajn teniĝojn de ebruloj kaj ankaŭ aludas ilian rilaton.

Alia valora skulptaĵo "Bodisatvo Avalokitesvara kun Mil Manoj" kovras areon de preskaŭ cent kva-



*Stonskulptaĵoj sur rokmuro de Baodingshan*

drataj metroj. Ĝi havas altecon de nur 3 metroj, tamen post la dorso disetendiĝas 1,007 manoj pozantaj diference unu de alia, kiuj tenas en si malsamajn objektojn magiajn kaj ankaŭ okulon gravuritan en ĉiu manplato.


La kaverno Yuanjue estas rigardata kiel krono de la arto de Baodingshan. Elfosita sur la kompleta rok-peco, ĝi altas je 5.5 metroj, larĝas je 8 metroj kaj profundas je 12 metroj. Sur ĝia plafono troviĝas

fenestro, tra kiu la suno verŝas sian lumon sur bodisatvon en la centro de la kaverno. Dank' al tiu fasko da lumo ankaŭ aliaj 12 bodisatvoj sidantaj sur lotusa trono ambaŭflanke de la kaverno fariĝas videblaj. La akvo penetriginta en la kaverton estas enkondukita tra buŝo de ŝtona drako en bovlon en la mano de budha statuo kaj poste estas forkondukita tra kaŝita kanaleto. En la profunda kaverno ritme sonas akvogutoj. Ja estas belega verko.

*La skulptaĵo "Mamnutrado"*



*La skulptaĵo "Bovobredistoj"*




# Agrabla somerumejo— Mogan- montaro

*Nubomaro en Mogan-montaro*

**L**A nomita montaro situas en la okcidenta parto de Deqing-gubernio de Zhejiang (Ĝegiang)-provinco. Je 60 km. sudokcidente de ĝi, situas la pitoreska urbo Hangzhou (Hangĝou) kaj je 200 km. nordoriente de ĝi troviĝas Shanghai (Ŝanhajo), la plej granda urbo de Ĉinio.

Gia nomo devenis, laŭ onidiro, de jena legendo: antaŭ 2,000 jaroj Ĉinio estis en la fina parto de la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno, kiam la regnestroj militadis por hegemonio. La regnestroj konkure varbis lertajn metiistojn por produkti armilojn. La estro de Wuregno He Lü ordonis ke la fama spadforĝisto Gan Jiang kaj lia edzino Mo Ye forĝu paron da akregaj spadoj, kaj diris, ke se ili ne plenumos la taskon en la tempolimo, ili ambaŭ estos enkapigitaj. La geedzoj do ekfaris fajron en sia forno sur la monto. Ardis la fajro, sed la ercoj ne fandiĝis. Mo Ye informiĝis, ke por sukcesigi la aferon necesas oferi virinan korpon al la Forna Dio. Por protekti sian edzon, ŝi sin jetis en la fajron kaj la ercoj tuj likvidiĝis kaj sur la forna fundo mirakle estiĝis paro da akregaj spadoj. Poste la femala spado nomiĝas



Mo Ye kaj la maskla Gan Jiang. La posteuloj kunigis la familiajn nomojn Mo Gan de tiu geedza paro kaj tiel kreis la estantan nomon de la menciita loko.

Mogan-montaro kun Yin-monto kiel sia centro ampleksas multajn montpintojn. La tuta regiono longas je 15 km. de oriento al okcidento kaj larĝas je 12 km. Kvankam malpli impona kaj majesta ol aliaj famaj montoj, tamen ĝi ĝuas renomon pro sia malvarmeta agrableco kaj estas unu el la kvar famaj somerumejoj de Ĉinio. Ĉiujare en la ardaĵ someraj tagoj, kiam la loĝantoj de Shanghai kaj Hangzhou estas turmentataj de netolerebla varmego, la tiea temperaturo estas malpli alta je 7-8°C ol en la supre menciitaj lokoj. Ĝi logas la somerumantojn per sia malvarmeta agrableco. Sur la ŝtonmuro apud la monta enirejo okulfrappe vidiĝas gravuritaj ideografiaĵoj "Agrabla Somerumejo".


Yin-monto altas ĉ. 600 m. Vilaĵoj tie kaj tie elrigardas inter la bambuaroj aŭ kaŝiĝas en la nubaro. Sur la prospera Yinshan-strato staras hotelo, restoracio, ĉiovendejo, poŝtofocejo k.a. La turistoj plejparte prenas tie tranoktejon por oportune promeni laŭ la serpentuma ondanta montvoĵeto kaj ĝui la ĉarman pejzaĝon.

Jianchi-lago, kaŝita en la ravino de Yin-monto, estas la plej bela loko de Mogan-montaro. Se oni iras malsupren laŭ la ŝtona ŝtuparo, trapasinte la elegantan etaĝdometon kun flave glazurita tegmento kaj Yinshan-groton kun florantaj arboj, oni povas aŭdi akvomurmuradon. Jen plaŭdas akvofalo. Se oni antaŭen iras plie, post trapaso de ŝtona ponteto, oni trovas tondranta kaskadon sube ĉe la piedoj. Malsupren irante laŭ la balustrado ĉe la klifo, oni trovas kioskon ĉe rokmuro. Se oni rigardas de la kiosko foren al la silkajsimila akvofalo pendanta en la bambuaj verdaĵoj, oni raviĝas antaŭ la tondranta falakvo. Jianchi-lago situas malsupre. La pli ol dek metrojn alta akvokolono torentas jen oblikve jen vertikale malsupren laŭ la rokoj kaj fine verŝiĝas en la lagon, disŝutante akverojn similajn al dissaltantaj perloj. Lavi la pie-



# *Mogan-monto*

Fotoj de WANG SHOULIANG



Nuba maro



Sunleviĝo


Jianchi-lago








Tianqiao-ponto



Kiosko en bambuaro



Yinshan-kaverno



Pado en bambuaro



FOTOJ PRI NATU-  
RAJ BELAĴOJ FA-  
RITAJ DE E-ISTOJ

de OTTO GESSNER (FR Germanio)



Vesperiĝo post fulmotondro

dojn en la lago estas vere plezure. Laŭ legendo, tie Gan Jiang kaj lia edzino forĝis la spadojn. Ĉe la lago troviĝas rokego nomata "Spadakriga Ŝtono". Laŭ onidiro, kiam Gan Jiang finforĝis la spadojn, li ilin akriĝis sur tiu rokego per akvo en la lago, ke ili fariĝis ekstreme akraj. Nordoriente de la lago sur la kruta rokego staras kiosko, en kiu oni povas ĝui panoramon de la lago. Tamen la akvofalo ne finiĝas tie. Tio estas nur ĝia unua ŝtupo. Atinĝinte la lagon, post momenta halto, la fluo enverŝiĝas rekte en alian akvorezervujon, formante la duan, pli majestan falakvon 30 metrojn altan. Malsupren de la rezervujo, la fluo sin ĵetas formante la trian malaltan ŝtupon. De tie la verda akvo zigzage fluas foren kaj fine malaperas en verdaj bambuaroj.

Ascendante laŭ la montvojetoj nordokcidenten oni atingas Fragmit-lageton, alinome "Gonga-tambura Ĉambro". Legendo diras ke antaŭe tie estis templo, en kiu budhoj preĝis akompanate de gongado kaj tamburado. De tio devenis tiu nomo. Nun tiu loko jam transformiĝis en la Parkon Fragmit-lageton. Ĉe la parka enirejo malantaŭ la arkpordo statuo de gruo en pozo senĝena staras en ovala cisterno, en kiun fonto senĉese ŝprucigas akvon malvarmetan. En la parko ĉie parfumiĝas floroj. Zigzagaj galerioj, kioskoj kaj subĉiela dancejo kaŝiĝas inter la verdaj arbaroj. Tie oni povas ĝui kaj ĝardenajn belajojn kaj naturan pejzaĝon.

Se oni iras okcidenten ekde la Fragmit-lageto, oni povas atingi la kulminon de Mogan-montaro — Pa-

godo-pinton je 758 m. super la mar-nivelo. Ĉar sur ĝi estas antikva pagodo, konstruita en 937 p.K., ĝi ricevis la nomon. De tie oni povas vidi Tai-lagon en la nordoriento kaj Qiantang-riveron en la sudoriento. Tie estas ankaŭ oportuna loko por ĝui pejzaĝon de sunsubiro.

Krom la fonto kaj kaskado, ankaŭ la tieaj bambuoj kaj nuboj estas vidindaj. La densaj bambuaroj konsistigas trionon de la 260 hektaroj da altaj verdaĵoj sur la montaro. La bambuoj ĉe Yin-monto estas precipe dikaj, ĉiu tigo altas je 8-9 m. kaj dikas kiel bovlo. En la densaj bambuaroj ombriĉaj agrabla venteto refreŝigas la turistojn kaj forgesigas al ili la someran varmegon. Estas vere plezurege promeni inter la verdaj pinarboj kaj bambuoj, vualitaj de nebuloj kaj nuboj.



## Kial en EPC Mankas

### Korespondanconoj de Ĉinaj Esperantistoj?

**D**E tempo al tempo iuj el niaj legantoj prezentis al ni tian demandon: Kial en la rubriko "KORESPONDI DEZIRAS" en EPC malofte aperis korespondanconoj de ĉinaj esperantistoj?

Nia redakcio neniam rifuzis publikigi korespondanconojn de ĉinaj esperantistoj. En nia konstitucio estas difinite, ke ĉiu civitano ĝuas liberon de korespondo. Tamen ni devas konfesi la fakton, ke ĝis nun ankoraŭ malofte venas al ni anoncopeto de ĉinaj esperantistoj. La kaŭzoj verŝajne estas jenaj:

1. Dum longa tempo Esp-movado ne vigle disvolviĝis en Ĉinio. Iuj el la malnovaj esperantistoj estas tro maljunaj, kaj aliaj tro okupitaj je laboroj kaj mankas al ili tempo por korespondi esp-e. Lastatempe miloj da personoj en Ĉinio komencis

lerni nian lingvon, sed nun ili ankoraŭ ne kapablas bone sin esprimi. Kvankam Esperanto estas pli facila ol iu ajn nacia lingvo, tamen por ĉinoj ĝi ne estas tiel facila kiel por eŭropanoj. Portempe en Ĉinio ne estas tiom multe da kapablaj esperantistoj kiom en eŭropaj landoj.

2. En la pasinta certa periodo la konstitucio de nia lando estis tretita de la kontraŭevolucia klico de Lin Biao kaj la kvarpersona bando, dume iuj esperantistoj suferis diskriminacion kaj persekutadon pro sia korespondo kun fremdlandaj esperantistoj. Nun tiuj eraroj estis jam korektitaj. Multaj el la veteranaj esperantistoj denove komencis korespondi kaj multaj novaj esperantistoj starigis rilatojn kun eksterlandaj amikoj.

3. La afranko por unu aerpoŝta letero al eksterlando egalas ĉ. unu

procenton de la monata salajro de ordinaraj intelektuloj aŭ laboristoj. Krome, post taga laboro oni ofte devas dediĉi sian liberan tempon al studado aŭ hejma laboro kaj restas ne multe da tempo por aliaj aferoj. Se oni havas multe da korespondantoj aŭ per la anonco venigas amasegon da leteroj, tio probable kaŭzas al li pezan ŝarĝon en la elspezoj de mono kaj tempo. Tial multaj preferas elekti korespondantojn el la anoncoj de alilandaj esperantistoj anstataŭ publikigi sian propran adreson.

Nun ni povas ĝoje diri, ke brila perspektivo jam sin prezentas. Oni konstatas, ke Esp-movado pli kaj pli vigliĝas en Ĉinio kaj novaj esperantistoj fariĝas pli kaj pli maturaj. Ni estas certaj, ke oni trovos pli kaj pli multe da ĉinaj korespondantoj en la ne malproksima estonteco.





# Teoria fundamento de Esperantismo\*

*De post la regno de Aŭgusto ĝis proksimume la tempoj de Atilla, de Clodwig, de Gondebaud, dum dek jarcentoj . . . la tero konata havis unu solan lingvon: oni parolis la latinan de Eŭfrato ĝis la monto Atlas . . . Hodiaŭ Bergamano\*\* kiu vojaĝas en la malgrandaj svisaj kantonoj, de kiuj li estis apartigita nur per unu monto, bezonas interpretistojn kvazaŭ li estus en Ĉinujo. Tio estas unu el la plej grandaj malfeliĉoj de la vivo.*

F. M. VOLTAIRE

La Esperanto-movado estas samtempe lingva, idea kaj socia movado, kion entute ni povas nomi esperantismo. La kompleksa fenomeno de esperantismo estas studebla plurbranĉe: ĝi povas esti studata kiel konscie farita lingvo; esploreble estas ankaŭ kiomgrade ĝi estas artefarita kaj kiom ĝi estas evolulingvo — determinita far historiaj faktoroj de la medio. Sed, la lingvistika signifo de Esperanto superkreskas la tipan kadron de la konstruitaj lingvoj, ne nur pro tio ke ĝi ne estas arbitra kreaĵo, sed ankaŭ tial ke Esperanto iĝis viva lingvo akceptita de adeptoj kaj uzata en internaciaj rilatoj ĉiam pli kaj pli.

Ĉi tiu proceso de spontana akcepto kaj disvolvo de Esperanto meritas pli detalan esploradon, ĉar kun la tendencoj de la disvolvo de Esperanto kaj kun vastiĝo de la kampoj de ĝia apliko kaj uzado, estiĝas nova kampo por esplorado de sociaj aspektoj de la Esperanta movado, samkiel de la estontaj vojoj de ĝia disvolvo.

Esperanto ne estas izolita manifestado ĉu en Eŭropo aŭ en la Oriento. Ĝi aperas kiel fina produkto de konverĝaj ideoj ligitaj al la problemo de komunikformo, kaj ankaŭ kiel konkretiĝo de streboj kiuj en sia esenco prezentas paŝojn al pli unueca kaj humana homaro. Tiusence Esperanto prezentas ne nur vivigitan ideon de interlingvismo, sed ankaŭ doktrinon pri ĝia historia celo kaj civiliza misio.

Ĉi tiu tendenco estiĝas en la epoko de la grandaj malkovroj de la Nova Epoko kaj ĝi estas sekvo de la novestiĝinta monda sociordo. La disvolviĝo de kapitalismo havis multnombrajn influojn sur la naciajn lingvojn. Kun ekspansio de scienco, internacia merkato kaj trafiko, spontane estiĝis kaj plue estiĝas ĉiam pli kompleksa internacia lingva materialo. Ĝi ne nur konsistas el granda nombro da radikoj samaj en multaj lingvoj, sed ankaŭ interproksimigitaj esprimmanieroj en multaj lingvoj. Kaj tiu ĉi grandega ekonomia disvolvo ĉiam pli forte

tiris la homaron en ĉiam pli firman internacian ligitcon. Tiel surbaze de la internaciaj komponantoj en naciaj lingvoj elkreskis fundamentoj de la internacia lingvo en la sino de la monda progreso. La esperantistaro kun sento de homarano fariĝis la internacia socia fundamento, sur kiu kuŝas la internacia lingvo Esperanto.

Ĉi tiu psikosocia aspekto de la Esperanto-movado, videbla jam ĉe la estiĝo de l' movado kiel efektiviĝo de la ideo pri internacia lingvo, speguliĝas en kresko de la movado en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo. La universala diapazono de la problemaro de esperantismo trovis siajn adeptojn en ĉiuj socitavoloj kaj ĉiuj raso, kio manifestiĝas per unu baza platformo, pli pro la samaj ideologiaj strebadoj ol pro ĝia materia organiziĝo. Do, la psikosocia aspekto de Esperanto elfontas el ĝia homeca ideo. De tie devenas ankaŭ la alligita signifo de la termino "esperantisto". Esperantisto ne estas tiu kiu nur parolas Esperanton sed tiu kiu, krome,

akceptas Esperanton kiel internacian lingvon kaj luktas por firmigo de la menciita doktrino.

Esperantismo hodiaŭ prezentas solidan aron da sciencscioj pri lingvistikaj, kulturaj kaj aliaj problemoj de la homaro kaj adekvate al tio — ellaboritan doktrinon pri la rolo de Esperanto-movado en solvado de problemoj de la nuntempa homaro.

Kiel lingvo kreita per konscia sintezo de internaciaj komponantoj el naciaj lingvoj, ĝi jam montras al la mondo siajn perspektivojn ke ĝi iĝu internacia interkomprenilo kaj malfermu vojon al novaj dimensioj kaj nova kvalito por la homaro.

Ĉi tiun rolon Esperanto komencas ludi kaj sur literatura kaj sur scienca kampoj. Kvantkam en la mondo estas nesufiĉe konataj la atingoj de la Esperanto-movado, ĝi dum la ĝisnuna ekzisto riĉigis la tutmondan literaturon per kelkmil originalaj verkoj. La speciala kvalito de la Esperanta literaturo estas en tio, ke ĝi ne reflektas nocion kaj fenomenojn aparte, laŭ vidpunkto de unu nacio, sed laŭ reciproka rilato de la tuta mondo. Kaj sur la tradukkampoj de naciaj literaturoj Esperanto ponte kunigas la plej forajn kulturojn. Verkoj de malmulte konataj kulturoj antaŭe ne tradukitaj al iu ajn fremda lingvo esperantigite rondiris la tutan mondon.

En la scienco, kie la informiteco estas decidgrava, Esperanto estas sufiĉe matura por anstataŭi multekostajn sistemojn, ŝparigi grandajn elspezojn por tradukado kaj esence helpi plibonigon de sciencinformado.

Oni ne devas utopie pensi ke Esperanto mem povus forigi la

kontraŭecon disŝirantan la mondon, tamen, ĝi malfermus vojon al pli interesa kunlaboro kaj proksimiĝo de la popoloj kaj pere de tio ĝi esence helpus la proceson de estiĝo de pli humana homaro. En tio speguliĝas ĝia epoka misio.

Mi pensas ke nenio pli bone bildigas la esencon de tio ol la sekvantaj vortoj de prezidanto Tito.

“En la nuntempa pacbatalo en la mondo, kiu enhavas ankaŭ proksimiĝon kaj disvolvon de plej multflanka kunlaboro inter ĉiuj landoj, nekonsidere la soci-sistemojn de opaj landoj, grava rolo apartenas ankaŭ al Esperanto-movado. Precipe grava kontribuo de esperantistoj povas esti en la disvolvo de kultura kunlaboro, ĉar tiele, interalie, estas ebligataj kondiĉoj por politika, ekonomia kaj ĉiu alia kunlaboro, al kiu nuntempe strebas ĉiuj progresemaj kaj pacemaj fortoj en la mondo.”\*\*\*

La naciaj lingvoj, eĉ kiam parte estas disvastigitaj ekster siaj naciaj teritorioj, restas naciaj. Ĉiu nacio estas spirita posedanto de sia gepatra lingvo. Alinacianoj povas ellerni fremdan nacian lingvon pli aŭ malpli bone, sed ili ne povas disigi ĝin de ĝia socia medio. La lingvo estas socia fenomeno kaj tiu, kiu ĝin studas, neeviteble ekkonas la kulturan, spiritan kaj ideologian heredaĵon de tia lingvo. Iompostiome, konscie aŭ nekonscie, li alproprigas tiun heredaĵon kaj trovas sin influita de ĝi.

Hodiaŭ kelkaj lingvoj estas vastiĝantaj, kaj ili faras fortan influon sur la lingvojn kaj kulturojn de la malgrandaj nacioj. Kiel multa estas la influado de la “mondaj” lingvoj kaj kulturoj

sur la lingvojn kaj kulturojn de la malgrandaj nacioj? Sufiĉas ekrigardi la situacion ĉe ni jugoslavo. Nia lingvo ĉiam pli perdas la nacian purecon. En ĝin enŝoviĝas multaj fremdajoj — tiel nomataj internaciaj vortoj, fakte plej ofte anglaj vortoj. Ni estas inunditaj de angl-usonaj filmoj, televidserioj kaj malliteraturoj.

La teknika progreso sur la kampo de transporto kaj telekomunikado montras klare ke la fizika proksimiĝo de ĉiuj popoloj estas plenumita. Sed tamen la popoloj restas disigitaj far lingvaj baroj. Ekirante de tiu platformo oni vidas, ke Esperanto montriĝas kiel solvo al la problemo de interhoma kompreniĝo. Lingvo kiu estas facile elernebla kaj neŭtrala, per la vastiĝo kaj ĉiama prospero de Esperanto-movado, spontane sin altrudas al la homaro kiel nepre ĉenero por la plua prosperado.

Bazita sur tiuj fundamentoj, la internacia lingvo Esperanto komencas ludi rolon en la moderna mondo. Ĝia spontana akceptado kaj aplikado en diversaj vivobranĉoj samtempe montras la ekziston de bezono de tia lingvo kaj plenumeblecon de ĝi per Esperanto.

Ĉio kio estas dirita igas nin fari konkludon pri la vera esenco de Esperantismo. La vera senco de la ekzisto de Esperanto estas, ke ĝi transpontu abismojn sur la vojo al pli feliĉa estonteco.

\* Ĉi tiu artikolo estas el la libro “Viva la Lingvo”, kaj iom mallongigita de la redakcio.

\*\* Loĝanto de Bergamo de Italio.

\*\*\* Broŝuro: Tito o esperantu, eld. Sarajevski univerziteti esperanto klub, Sarajevo 1973. p. 8.



# Manko de komuna lingvo —kapdoloro de la Eŭropa Komunumo

LA Eŭropa Ekonomia Komunumo nun konsistas el 9 membro-landoj, kaj al ĝi aliĝos ankaŭ Grekio, Portugalio kaj Hispanio. La Komunumo uzas 6 laborlingvojn kaj ĝiaj tradukistoj kaj interpretistoj estas pli multaj ol la oficistoj de la stabo de UNO, Nord-Atlantika Trakta Organizaĵo aŭ UNESKO. Tamen, malgraŭ tio, ankoraŭ multaj landoj opinias la laborlingvojn nesufiĉaj kaj postulas, ke la Komunumo prenu iliajn naciajn lingvojn kiel laborlingvojn. Oni diris, ke se ilia peto estos plenumita, do la laborlingvoj de la Komunumo superos 20, kaj tio sendube elspezigos pli multe. Dume aliaj landoj trovis, ke tiu flanko elspezo jam estas terure peza kaj oni ne devas plimulti laborlingvojn. Pro tio la lingva problemo de la Komunumo restas ĝis nun nesolvita.

En la 19-a de januaro de 1979, iu brita delegito faris paroladon en la kimra lingvo, kio surprizis la kunvenantojn —neniu komprenis lin. Je la fino de sia parolado li postulis en la angla lingvo, ke oni oficialiguan lingvon kiel laborlingvon. Je la fino de la kunveno, estro de la Irlanda Delegaĵo postulis, ke en ĉiu kunveno oni devas pretigi tradukiston de la gaela lingvo (la nacia lingvo de Irlando), kaj akcentis, ke oni ne devas praktiki politikan diskriminacion. Tio atentigis, ke la lingva problemo de la Komunumo ne estas problemo sole ekonomia, sed ankaŭ politika.

Nun la Eŭropa Ekonomia Komunumo havas pli ol 400 tradukistojn sole en Bruselo, kaj tiu nombro estas preskaŭ kvaroblo de la tra-

dukistaro (105) de UNO en Novjorko. En la komitato de la Komunumo 36 procentoj de la tuta laborantaro estas tradukistoj, kaj dum kunveno tiu nombro atingis 54%. En la ekonomiaj kaj sociaj komitatoj kaj en la tribunalo la nombro de tradukistoj superis 63%. En 1979 la Komunumo tradukis 600 milojn da paĝoj da materialoj kaj paroladoj, kaj por tio elspezis 4 milionojn da usonaj dolaroj. Post kiam Hispanio, Portugalio kaj Grekio fariĝos ĝiaj membro-landoj, la elspezo tiucela kreskos 2.5-oble. Kaj en tia cirkonstanco la Eŭropa Parlamento ankaŭ konfesis, ke la solvo de lingva problemo estas tre urĝa afero. Sed kie estas la eliro?

Iuj membro-landoj de la Komunumo proponis la metodon de UNO. Kiel ĉiuj scias, UNO havas 6 oficialajn lingvojn, nome la anglan, francan, hispanan, rusan, ĉinan kaj araban. Laŭ la reguloj, se oni parolas al la kunveno de UNO ne en iu ajn el la 6 lingvoj, li devas pretigi por si interpretiston per si mem. Sed nemalmultaj landoj plendis kontraŭ tiu regulo kaj kelkaj eĉ protestis. En la lastaj du jaroj kelkaj prezidantoj de afrikaj landoj faris al la Ĝenerala Asembleo de UNO paroladon eĉ en ilia propra dialekto. Do evidente, ankaŭ la metodo de UNO ne estas imitinda.

La stabo de la Komunumo iam elmetis, ke por redukti la elspezon, oni devas malmulti interpretistojn kaj iom multi tradukistojn, nome oni interpretas nur en la angla kaj franca lingvoj, kaj la aliaj lingvoj estas uzataj nur en tradukado. Provo malsukcesis, ĉar ne ĉiuj kun-



Desegnaĵo de Hans Bakker (Nederlando)

*La Utileco de Esperanto (Domaĝe, oni ankoraŭ tion ne komprenas.)*

venantoj estas profesiaj diplomatoj, kaj ili ankoraŭ uzas sian lingvon en debatado. Eĉ profesiaj diplomatoj ne tute povoscias la oficialajn laborlingvojn.

La Komunumo klopodas por solvi tiun problemon per tradukmaŝino. La Komunuma Komitato fondis en Luksemburgo grandegan altklasan tradukan centralon, kaj la tuta centralo estis ekipita de Usono. Sed provo montris, ke ĝi frontas ankoraŭ multajn komplikajojn. Ekzemple, okazis ridindaĵo: Iufoje, parlamentano D-ro Van Hoof faris paroladon, kaj la tradukmaŝino tradukis france lian nomon "D-ro Van Hoof" en la nomon "hufo de D-ro Van".

Kie estas la eliro? Tio ne estas facile antaŭvidebla.

*La originala artikolo aperis en la ĉina duonmonata gazeto "Monda Kulturo", n-ro 24 de 1980. Ĝi helpas nin pli bone kompreni la urĝan neceson por forigi la lingvan haoson nun alfrontatan de la internaciaj organizoj.*

— La Red.

# KONCIZA MAPO DE ĈINIO







REGIONO DE INTERNA MONGOLIO

HEILONGJIANG

JILIN

LIAONING

BEIJING

HEBEI

SHANXI

SHANDONG

SHAANXI

HENAN

ANHUI

JIANGSU

HUBEI

JIANGXI

FUJIAN

GUANGDONG

TAIWAN

HAINAN I.

JAPANA MARO

FLAVA MARO

ORIENTA ĈINA MARO

PACIFIKA OCEANO


SUDA ĈINA MARO

SUDA ĈINA MARO

Instituto en la Suda Ĉina Maro 440 Km

# Korespondado

## amikigas



*Membroj de Esp-grupo de Suzhou en ĝardeno*

**D**E post la naskiĝo de Esperanto korespondado inter esperantistoj de diversaj landoj fariĝis grava konsistiga parto de Esperantomovado. Ĝi ne nur pruvis, ke Esperanto estas bona komunikilo kaj povas plifortigi interkompreniĝon kaj amikecon inter la popoloj de diversaj landoj, sed ankaŭ unuigis ĉiujn samideanojn de la mondo en la batalo por disvolvi internacian helpan lingvon kaj efektiviĝi la belan idealon de la homaro. Pri tio mi iom parolu pri la sperto de nia Suzhou-a Esperanto-grupo. En la lastaj du jaroj ni ricevis leterojn el Japanio, Francio, Jugoslavio, Finnlando, FR Germanio, Kanado, Ĉeĥoslovakio, Belgio, Svedio, Britio, Usono, Nederlando, Pollando k.a. La skribintoj estas plejparte instruistoj, laboristoj, oficistoj kaj studentoj.

La unua letero, kiun ni ricevis, estis sendita de iu junulo jugoslavia. En sia letero li esprimis la deziron korespondi kun f-ino kies foto aperis en EPC. Ni transdonis la leteron al tiu juna laboristino, kaj ŝi respondis lin per letero kun poŝtmarkoj kaj pridemandis lian intereseon.

Ni korespondis amike kun angla esp-isto, kvankam li ne tute aprobis iujn diplomaciajn politikojn de la ĉina registaro. Ni sendis al li la angla-lingvan periodaĵon "Beijing Review" (Pekina Revuo), kiu aperigis materialon klarigantan pri la

eksteraj politikoj de nia registaro. Por tio li nin dankis, kvankam li ankoraŭ persistas en sia opinio.

Niaj junaj kursaninoj havas korespondantinojn en Japanio kaj Svedio. Ili interŝanĝis ne nur amikajn leterojn, sed ankaŭ donacojn. Ili ricevis de la amikinoj pupon kaj librojn, kaj sendis al ili ĉinajn metiartaĵojn kaj pentraĵojn. Iu kursanino deziris koni la enoficiĝon de japanaj virinoj kaj ŝia korespondantino skribis al ŝi, ke la japanaj virinoj povas akiri laboron, tamen multaj obstakloj kuŝas sur ilia vojo, nome: 1) ili ne havas tiel multajn ŝancojn por akiri laboron same kiel la viroj; 2) ili ne povas akiri egalan salajron por egala laboro, precipe en privataj entreprenoj; 3) virino kun aĝo super 45 jaroj (dum viroj kun aĝo super 59 jaroj) ne povas ricevi laboron; 4) virinoj ofte perdis sian laboron pro edziniĝo aŭ nasko, ĉar mankas sufiĉe da infanvartejoj kaj estas malfacile por junaj patrinoj daŭrigi la laboron.

Demandite de kanada amiko pri tio, ĉu ekzistas en Ĉinio libereco de religia kredo, iu grupano respondis, ke ĉiu ĉino ĝuas liberon kredi aŭ ne kredi religion. En la kultura revolucio ĉinaj religiuloj estis persekutitaj kaj religiaj aktivadoj nuligitaj. Sed nun nia registaro helpas ilin en riparado de preĝejoj, moskeoj, temploj k.a., kaj religiaj aktivadoj estas protektataj.

Estas tre interese kaj utile por la korespondantoj interŝanĝi sciojn kaj opiniojn pri diversaj aferoj grandaj aŭ malgrandaj.

Iu alia grupano diris, ke lia leteramiko atentigis lin, ke li ne tuŝu tro multe politikon en sia leteroj al li. Iu usonano esprimis sian deziron amikiĝi kun ĉinoj pere de nia grupo, kaj li esperas, ke oni ne parolu la problemojn kiujn li ne ŝatas. Tiuj atentigoj montris sincerecon inter amikoj.

La leteroj de la diverslandaj geamikoj konigis al ni vivecajn lingvaĵojn kaj freŝajn vortouzojn, kiujn ni neniam antaŭe konis. Kaj krome, ili liveris al ni bonajn temojn por interparola ekzerco en la kurso kaj interesan materialon por ekspozicio ĉe nia loko por disvastigo de Esp-o.

Koncerne al korespondo kun ali-landaj geesperantistoj ni opinias: 1) al ĉiu letero oni nepre devas respondi senprokraste almenaŭ unu fojon; 2) skribi klare; 3) ne trudi sian opinion aŭ kredon al la leteramikoj; 4) preni temojn interesajn; 5) ĝentile reciproki donacojn.

Kompreneble, la korespondado povas havi eĉ pli grandan socian signifon, se diverslandaj korespondantoj interkonsentas pri tradukado de gravaj literaturaj kaj sciencaj verkoj pere de Esp. en naciajn lingvojn por ilin prezenti al la neesperantista publiko.





*Inaŭgura kunveno de la Pekina Esperanto-Asocio*

## *Inaŭgura kunveno de la Pekina Esperanto-Asocio*

**P**OST 8-monata streĉa preparado fondiĝis la Pekina Esperanto-Asocio, je la 25-a de januaro de la kuranta jaro. Ĝian solenan inaŭguran kunvenon ĉeestis pli ol 300 homoj, inter kiuj estis griz-haraj veteranaj esperantistoj de la 20-aj kaj 30-aj jaroj, samideanoj el la Esperantaj laborunuoj, el institutoj kaj el aliaj laborpostenoj. Ĝin ĉeestis ankaŭ junaj Esperantaj kursanoj de Beijing. Tia renkontiĝo de malju-

naj, mezaĝaj kaj junaj esperantistoj estis senprecedenca en la historio de la Esperanto-movado de Beijing.

En la kunvenejo, sur la muro post la podio pendis verda horizontala rubando kun surskribo "Inaŭgura Kunveno de la Pekina Esperanto-Asocio". Sub la rubando pendis la portreto de D-ro Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Ĉirkaŭ la podio metiĝis florzvoj, kaj gajaj Espe-

rantaj kantoj sonis laŭte tra la tuta halo.

Unue, kamarado Ge Baoquan, estro de la prepara grupo de la Pekina Esperanto-Asocio, koncize raportis al la kunveno laboron de la prepara grupo pri varbado kaj registrado de asocioj, propagando de Esperanto, eldonado de Esperantaj libroj, funkciigo de Esperantaj kursoj, akcepto de fremdlandaj esperantistoj k.a.

*Antaŭ la kunveno la libro-servo de ĈEL vendas esperantajjn.*



La kunveno pasigis la "Statuton de Pekina Esperanto-Asocio" kaj aprobis per varma aplaŭdado la decidon ke Chu Tunan, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj vicestro de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj, funkciu kiel honora prezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio kaj Zhang Zhiyi, Lu Xuzhang, Liu Zunqi, Zhang Guangnian, Lü Ji, Wang Zhongfang, Li Ling kaj aliaj 7 veteranaj espe-



*Ge Baoquan faras raporton en la kunveno.*



*Chu Tunan donas paroladon.*

rantistoj kiel honoraj membroj de la Konsilantaro de la Pekina Esperanto-Asocio. La kunveno elektis Ge Baoquan, faman ĉinan tradukiston kaj veteranan esperantiston, kiel prezidanton de la Pekina Esperanto-Asocio, Jin Ziguang, vicedron de la Ŝtata Administra Buroo de Kulturaj Objektoj, Wang Jihua, vicedron de la Eldonejo de la Ĉina Enciklopedio, Xu Shanshu, vicedron de la bildgazeto "Ĉinio", Zeng Hojaŭ, vicedron de la Eldonejo de Elektra Industrio, kaj Honfan, membron de la Konsilantaro de la Ĉina Esperanto-Ligo, kiel ĝiajn vicprezidantojn.

En la kunveno Chu Tunan, Zhang Zhiyi, vicedro de la Departemento de la Unuecfronta Laboro de la

Centra Komitato de KPC, Ye Laishi (Ĵelezo), vicprezidanto de ĈEL, kaj Lü Ji, prezidanto de la Asocio de Ĉinaj Muzikistoj, parolis pri la brilaj sukcesoj de la ĉina Esperantomovado en la 20-aj kaj 30-aj jaroj. En sia parolado Chu Tunan emfazis, ke Ĉinio devas fari ankoraŭ pli grandan kontribuon en disvastigo de Esperanto. Muzikisto Lü Ji diris: "Same kiel Esperanto muziko ne havas landlimon, kaj oni devas kombini ilin por ke ili ludu pli grandan rolon." En la nomo de ĈEL kaj la redakcio de EPĈ Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de ĈEL, faris gratulan parolon al la kunveno kaj donacis al ĝi silkan portreton de Zamenhof. Al la kunveno faris

gratulan parolon ankaŭ reprezentantoj de la Esperanta Sekcio de Radio Pekino, Esperanta Sekcio de Guoji Shudian kaj Esperantaj kursoj de la Beijing-a Lingva Instituto kaj Beijing-a Kultura Palaco de Laboruloj. La kunveno finiĝis en la gaja kantado de "Espero".

Prezidanto de ĈEL Hujucz kaj famaj ĉinaj verkistoj Mao Dun kaj Bakin esprimis sian gratulon al la Pekina Esperanto-Asocio pro ĝia fondiĝo. La kunveno ricevis gratulajn telegramojn kaj leterojn de Esperantaj asocioj kaj organizoj de Hubei, Hunan, la Interna Mongolio, Anhui, Wuhan, Chongqing, Chengdu, Bengbu, Xi-an, Shanghai, Guangzhou k.a.



## LA GUANGZHOU-A SATELITA OBSERVEJO STARIGITA

La nomita observejo sub la Ĉina Akademio de Sciencoj estas starigita en la nordorienta antaŭurbo de Guangzhou (Kantono). Ĝi havas kvar pezajn precizajn instalaĵojn projektitajn kaj fabrikitajn de Ĉinio

mem, inkluzive de optika spur-teodolito por determini la pozicion de la satelitoj, aparato por mezuri la satelitan rapidecon, lasera aparato por mezuri la distancon inter la satelitoj kaj atoma horloĝejo por montri precizan tempon kaj frekvencan normon, ĝustigi frekvencan precizecon kaj mezuri frekvencan stabilecon.

## PANDO-BREDEJO EN SICHUAN-PROVINCO

Establiĝis pando-bredejo en la Wolong-a Natura Rezervejo en Sichuan-provinco, sudokcidenta

Ĉinio, dank' al la klopodo de tieaj specialistoj.

Hodiaŭ 6 pandoj vivas en la bredejo, ĉirkaŭita de altaj pikdratoj. Interne de ĝi dense kreskas maldikaj bambuoj, plej ŝataj de la pandoj.

La Wolong-a Natura Rezervejo kun areo de 200,000 hektaroj estas la plej granda el la dek pando-rezervejoj en Ĉinio. Ĝi estas difinita kiel unu el la internaciaj naturaj rezervejoj de la konsilio "Homo kaj Biosfero" de UNESKO. Ĉinio kaj la Monda Fonduso por Sovaĝaj Bestoj baldaŭ starigos en Wolong esplor-centron por protekto de pandoj.




## FONDIĜIS LA PREPARA GRUPO DE LA GUANGZHOU-A ESPERANTA ASOCIO

La nomita grupo fondiĝis en la lasta decembro en Guangzhou (Kantono), la ĉefurbo de Guangdong-provinco. La estro kaj vicestro de la grupo estas respektive Ren Bosheng, vicestro de la Scienca kaj Teknika Komisiono de la provinco, kaj Liu Jiang, estro de la Guangzhou-a Fremdlingva Lernejo. La grupo sin preparas por funkciigi Esperantan kurson.

## EKFUNKCIIS LA PREPARA GRUPO DE LA NANNING-A ESPERANTA INSTITUTO

La prepara grupo, kiu fondiĝis en la fino de la lasta jaro en Nanning, la ĉefurbo de la Guangxi-a Ĝuangnacieca Aŭtonoma Regiono, aktive propagandas Esperanton. Ĝi starigis Esperantan kurson kaj kompilas Esperantajn lernomaterialojn. Ĝia honora estro estas Fang Hongyu, vicestro de la Propaganda Departemento de la Nanning-a Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio.

*Membroj de la Esperanta kurso de la urbo Nanning*



*Kurso de Esperantaj  
Instruistoj por Ele-  
menta Lernejo en la  
urbo Shaoyang*



## KURSO DE ESPERANTAJ INSTRUISTOJ POR ELEMENTA LERNEJO

Helpate de la Kultur-eduka Sekcio de la orienta kvartalo de la urbo Shaoyang de la provinco Hunan, la Hunan-a Esperanta Asocio funkciigis la nomitan kurson, en kiu lernas 30 personoj. La lernotempo estas duonjaro. Kaj ĝin gvidas Liang Yuqing, ĉefsekretario de la Hunan-a Esperanta Asocio. Kaj nun li kompilas Esperantan lernolibron provan por elementa lernejo. Post la finiĝo de la kurso parto el ĝiaj kursanoj instruos Esperanton en elementaj lernejoj.

## “HISTORIO DE ĈINA ENTOMOLOGIO” ELDONITA

“Historio de Ĉina Entomologio”, redaktita de la fama ĉina entomo-

logo prof. Io Chou, estas eldonita de “Entomotaxonomia”. Prof. Chou estas veterana esperantisto. En la pasintaj dekoj da jaroj li aplikis Esperanton al la scienco. Li elspicis pli ol 20 jarojn por studi ĉinajn antikvajn literaturojn kaj historiajn objektojn trovitajn en arkeologia prifosado kaj verkis la libron pri la historio de utiligo de la medicinaj kaj manĝeblaj insektoj kaj de bredo de silkraŭpoj kaj abeloj kaj pri esplorado de akridoj, arme-vermoj (*Leucania separata*) kaj aliaj fiinsektoj. La libro estas eldonita en la ĉina lingvo kun Esperanta resumo.

## ELDONIĜIS NOVA ESPERANTA LERNOLIBRO

De februaro ĉijare estas distribuita en Ĉinio nova “Esperanta Lernolibro” kompilita de ĈEL. En la lastaj du jaroj estis funkciigitaj Esperantaj kursoj en pli ol 40 urboj de nia lando. Ĉ. 30,000 homoj komencis lerni Esperanton. La nova “Esperanta Lernolibro” faciligas al ili la lernadon. Kaj krome, la Pekina Esperanto-Asocio reeldonis “Nova Vortaro Esperanta-Ĉina”. La Libroservo de ĈEL reproduktis sonbendojn de Esperantaj elparolo kaj konversacio por esperantistoj en diversaj partoj de Ĉinio.





# Porinfanaj legaĵoj kaj infanoj-legantoj

Fotoj de JI CUI


La eldonejoj de nia lando eldonis grandan kvanton da belaj legaĵoj por ili.

En Ĉinio troviĝas miloj da porinfanaj verkistoj kaj artistoj, kiuj fervore verkas librojn, prezentas teatraĵojn, rakontas historiojn kaj faras pentraĵojn por ili. Ili senlace instruas la geknabojn pri kulturo kaj scienco, por ke la nova generacio fariĝu saĝa, ĝentila kaj fidoplena.


Laborantino de la Shanghai-a Geknaba Domo prezentas interesajn legaĵojn al geknaboj.







Kiel absorbite!



Interesaj bildlibroj absorbas malgrandajn legantojn.

Famaj verkistoj Liu Xinwu kaj Liu Houyi skribas sian nomon por ge-  
knaboj.








Malgrandaj pentristoj kaj kaligrafoj

Famaj porinfanaj geverkistoj Xie Bingxin kaj Yan Wenjing pasigas festotagon kune kun geknaboj.



Sun Jingxiu, fama pedagogo, rakontas historion al la geknaboj.



Redaktoroj de la Ĉina Porinfana Eldonejo diskutas pri projektado de librokovriloj.



En geknaba legoĉambro




Snur-tirado, unu el la sportoj ŝatataj de la tu-aj virinoj

## VIRINOJ AMAS SPORTON

Fotoj de YANG CHANGZHONG

La tu-oj loĝas en la Huzhu-a Tu-nacieca Aŭtonoma Gubernio de Qinghai-provinco, Ĉinio. Antaŭe iliaj moroj estis konservativaj, sed post la Liberigo la tu-aj virinoj forskuis de si la katenon de feŭda ideologio kaj aktive partoprenas en diversaj sportoj.



Ili interŝanĝas sperton.

La unua virina korbopilka teamo de tu-nacieco en konkurso





## DU ESP. INFORMOJ EL JUGOSLAVIO

La tradicia 7-a Unuamaja Renkontiĝo de la E-Junularo okazos 1-3 majo 1981 en Zenica, industria kaj kultura centro meze de Jugoslavio. En ties programo estas antaŭviditaj labor-kunvenoj, kulturaj kaj amuzaj aranĝoj, ekskurso kaj diversaj aliaj aktivecoj. Oni atendas, ke tiun ĉi tre popularan renkontiĝon partoprenos pli ol 400 gejunuloj el ĉiuj regionoj de Jugoslavio.

Kiel eldonaĵo de E-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino en Esp. baldaŭ aperos plie novel-kolekto de Ivo Andriĉ, konata jugoslavia verkisto kaj nobelpremiito, forpasinta en 1975. Jam pli frue, en 1973, aperis en Esp. lia novelaro sub titolo "Sonĝo kaj Maldormo sub la Karpeneto".

## AKTIVAS PAKISTANAJ ESP-ISTOJ

La 3-a Kongreso de la Pakistana Esperanto-Asocio okazis je la 31-a de decembro 1980, en Rawalpindi. En la kongreso estis akceptitaj kelkaj rezolucioj, unu el kiuj temis pri

*La Pakistana Esperanto-Asocio okazigas ekspozicion de ĉinaj esperantaĵoj.*



esprimo de danko al estraro de El Popola Ĉinio pro kunlaboro por Esp. movado kaj pri tio, ke multaj pakistanaj samideanoj lernis kaj lernas Esperanton per EPC kaj trovas ĝin granda helpo por lerni la lingvon.

La Pakistana Esperanto-Asocio aranĝas Esp. ekspoziciojn en centraj urboj de la lando. Jen estas foto pri ekspozicio en Multan, kie estis montritaj EPC kaj ĉinaj Esp. eldonaĵoj.


## PIKNIKO DE ESP. SOCIETO DE NOVJORKO

Ĉi tie estas aperigita foto pri la pikniko de la Esp. Societo de Novjorko en aŭgusto pasintjare ĉe la Ueisa Ekologia Centro en urbeto Ringwood, New Jersey. La esp-ista grupo estis kantanta "Mia Kara Klementin", usonan folkloran kanton en Esperanto.

## TRIXINI EN ĈINIO

Trixini (Hansjorg Kindler), direktoro de la Esperanto-Centro Luksemburgo, komitatano de UEA kaj vicprezidanto de la Eŭropa Klubo, vojaĝis en Ĉinio de la 3-a ĝis la 26-a de februaro. Li vizitis la urbojn Bejing (Pekino), Xi'an (Hi'an), Changsha (Ĉangŝa), Guilin kaj

*S-ro Trixini prezentas magion al ĉinaj rigardantoj.*



Guangzhou (Kantono). Dum sia restado en Bejing li estis varme akceptata de geesperantistoj el ĈEL, la Redakcio de EPC, la Esperantaj Sekcioj de Radio Pekino kaj Guoji Shudian, kaj la Pekina Esperanto-Asocio. Akompanate de geesperantistoj, li vizitis la Grandan Muron, Dek Tri Maŭzoleojn de Mingdinastio, Someran Palacon, Imperiestran Palacon kaj Ĉielan Altaron. Laŭ invito li faris prelegon por pli ol cent esperantistoj. Post la prelego li projekciis filmon pri Luksemburgio kun Esperanta klarigo. La prelegon vizitis ankaŭ la aferŝarĝito de Luksemburgio en Ĉinio kaj lia edzino kaj la aferŝarĝito de Ĉinio en Luksemburgio kaj lia edzino. Antaŭ tio s-ro Trixini prezentis interesan magion al 400 ĉinaj rigardantoj. Ĉio ĉi ludis bonan rolon en propagando de Esperanto.



La aŭtoro

WU NINGGENG\*:

# POR ELIMINI INTERNACIAN EKONOMIAN DISKRIMINACION

ONI devas frakasi la malnovan internacian ekonomian ordon kaj starigi novan egalrajtan internacian ekonomian ordon, kio estas komuna deziro de la disvolviĝantaj landoj. En la Sesa Speciala Konferenco de UNO kunvokita en aprilo de 1974 oni aprobis “la Deklaracion pri Starigo de Nova Internacia Ekonomia Ordo”, en kiu oni solene proklamis, ke la disvolviĝantaj landoj “unuanime decidis batali por urĝe starigi novan internacian ekonomian ordon”.

Depost la konferenco la disvolviĝantaj landoj montris siajn grandajn fortojn en la batalado por starigi novan internacian ekonomian ordon, kio vekis grandan atenton de la internacia publiko.

La malnova internacia ekonomia ordo estas monda ekonomia sistemo, per kiu la evoluantaj landoj praktikis ekonomian diskriminacion al multaj aliaj landoj, precipe al aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj. Tiu ekonomia sistemo formiĝis en la longa tempo de la historia disvolviĝo. La formiĝo de la granda industrio de maŝinoj en la okcidentaj kapitalismaj landoj postulis ke ili kontinue plivastigu la eksterlandan merka-

ton kaj materialan devenon, kaj ebligis al ili trarompi ĉiajn barojn de antikvaj nacioj per malkaraj varoj en iliaj manoj. Ekz., post kiam Britio konkeris Hindion en la 18-a jarcento, tiu “patrolando de kotonteksajoj” fine fariĝis lando eksportanta kotonon al Britio kaj importanta de Britio kotonajn ŝtofojn.

La dua industria revolucio komencita en la sepdekaj jaroj de la 19-a jarcento estigis grandan ŝanĝigon en ekonomiaj rilatoj. Kiam monopolo stariĝis en la evoluantaj landoj, iom post iom formiĝis internacia ekonomia sistemo, per kiu tre malmulta nombro da “avangardaj” landoj praktikis ekonomian regadon super la plejparto de la loĝantoj en la mondo. Ĝia ĉefa enhavo estis:

1. En la produkta sfero, laŭ la principo de “labordivido inter kapitalismaj landoj” la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj devis liveri materialojn kaj agrikulturajn produktaĵojn al evoluantaj kapitalismaj landoj kaj aĉeti iliajn industriajn produktaĵojn. Eĉ nun tia stato estas ne radikale ŝanĝita, kaj la landoj de la vasta tria mondo ankoraŭ ĉefe eksportas primarajn produktaĵojn.

2. En la interŝanĝa sfero, la disvolviĝantaj landoj dum longa tempo estis senrajtaj en decido de prezoj en la monda merkato. La monopolaj kompanioj de la evoluantaj landoj vendis siajn industriajn produktaĵojn al disvolviĝantaj landoj je monopoliigitaj altaj prezoj kaj aĉetis primarajn produktaĵojn de la disvolviĝantaj landoj je malaltaj prezoj. Krome, per devigaj ekonomiaj kaj teknikaj helpoj la evoluantaj landoj pluapasa fortigis la malegalan interŝanĝon. Ĉar la ekonomio de la disvolviĝantaj landoj multe dependis de la monda merkato, la monopolo de la evoluantaj landoj super la monda merkato (inkluzive de prezoj ktp.) ofte kaŭzis haoson kaj malfacilojn al la disvolviĝantaj landoj en la ekonomia vivo.

3. En la valuta kaj financa sferoj, la grandaj bankoj de la evoluantaj landoj monopoligis la internaciajn financajn sistemojn, ili regis la financajn aktivadojn kaj ekonomian vivon de la disvolviĝantaj landoj per pruntedono, investo kaj aliaj aktivadoj.

4. La ekonomiaj organizoj de diversaj landoj kaj interkonsentoj, kiaj la Ĝenerala Kontrakto pri Tarifoj kaj Komercioj, la Monda Banko, la Internacia



Mona Fonduso ktp. antaŭe estis tenataj en la manoj de malmultaj evoluintaj landoj kaj servis al ili, kaj kaŭze de tio ili metis la disvolviĝantaj landojn en malegalan kaj malfavoran situacion.

Unuvorte, la malnovaj internaciaj ekonomiaj rilatoj malriĉigis kaj subevoluis la disvolviĝantaj landojn en longa tempo. Tio konigis la popolojn de tiuj landoj, ke por sia sendependeco, ekzisto kaj disvolviĝo, ili nepre devas frakasi la malnovan internacian ekonomian ordon kaj klopodi por efektiviĝi novan egalrajtan kaj justan internacian ekonomian ordon.

La rimarkindaj karakterizaĵoj de la internacia situacio post la Dua Mondmilito estas vekigo de la popoloj de aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj. En la lastaj pli ol 30 jaroj pli ol 90 landoj gajnis sian politikan sendependecon, kio tamen ne plibonigis la ekonomion de plejparto el ili.

Ĉar la evoluintaj landoj monopoligis la internacian merkaton kaj malaltigis la prezojn de primaraj varoj, la totala sumo de la monda eksporta komerco en la pli ol 20 jaroj de 1950 ĝis 1973 kreskis de 60.7 miliardoj da usonaj dolaroj ĝis 570.1 miliardoj da dol. kaj dume tiu de la disvolviĝantaj landoj de 18.5 miliardoj da usonaj dol. ĝis 99.4 miliardoj da usonaj dol. Ilia proporcio en la monda eksporta komerco reduktiĝis de 30.5% al 17.4%. En 1950 la eksporta kaj importa komercoj de la disvolviĝantaj landoj havis favoran saldon de proksimume 0.3 miliardoj da dol., sed en 1973 la deficiito de ilia eksporta kaj importa komercoj jam atingis 12 miliardojn da dol.


La malboniĝo de ekonomia stato kaj deficiito de ilia internacia bilanco multe pezis la ŝuldon de la disvolviĝantaj landoj. Laŭ enketo de la Monda Banko, la ŝuldoj de 86 disvolviĝantaj landoj estis 38.07 miliardoj da dol. en 1965, sed en 1972 ili jam atingis 99.38 miliardojn da dol. Multaj landoj devis elpreni pli ol 20% de la enspezo de eksporto por pagi ŝuldon. La senĉesa devaluto de la usonaj dolaroj kaj alilandaj monoĵoj, kaj la monda inflacio kaŭzis al la disvolviĝantaj landoj grandan ekonomian perdon. La eksteraj ŝuldoj de la disvolviĝantaj landoj kreskis rapide. En la komenco de la sepdekaj jaroj la ŝuldoj ĉiujare kreskis je ĉ. 20 miliardoj da usonaj dol., en la lastaj jaroj ĉiujare je 50-60 miliardoj da usonaj dol., kaj la totala sumo de tiuj ŝuldoj en 1978 jam atingis 350 miliardojn da dol.

La gravaj ŝanĝiĝoj de la internacia ekonomia situacio de

la sepdekaj jaroj plene montris, ke la malnovaj internaciaj ekonomiaj sistemoj falis en seriozan krizon, la klopodoj de la disvolviĝantaj landoj por disvolvi nacian ekonomion aŭ regionan ekonomion, reformi neracian internacian ekonomian strukturon kaj starigi novan internacian ekonomian ordon jam fariĝis historia tendenco de disvolviĝo de la monda ekonomio. Malgraŭ tio, ke la batalo por starigi novan internacian ekonomian ordon trapasos malfacilan kaj zigzagan vojon, la disvolviĝantaj landoj akiris nemalmultajn sukcesojn en la lastaj jaroj. En la duflanka traktado kun evoluintaj landoj ili subskribis novajn favorajn ekonomiajn kaj komercajn interkonsentojn, ekz., la Grupo de Afrikaj, Karibaj kaj Pacifikaj Ŝtatoj subskribis du Lome-kontraktojn kun la Eŭropa Komunumo en 1975 kaj 1979.

La disvolviĝantaj landoj publikigis multajn dekretojn pri

*La Ĝenerala Asembleo kunvenis en 1974 por krei novan internacian ekonomian ordon.*



protektado de riĉfontoj en sia lando, utiligo de fremdaj kapitaloj kaj teknikoj por protekti siajn suverenojn, kontroli kaj limigi la entreprenojn de fremdlandaj kapitaloj. Ankaŭ la ekonomia kunlaboro inter la disvolviĝantaj landoj multe disvolviĝis, stariĝis pli ol 20 regionaj aŭ duon-regionaj ekonomiaj unuecaj organizoj, ekz., la Grupo Andoj (Andean Group) kaj la Asocio de Sudorient-aziaj Ŝtatoj atingis sukcesojn en akordigo de ekonomiaj planoj kaj politikoj de la koncernaj landoj kaj en plurbranĉa ekonomia kunlaboro.

Surbaze de la koncernaj interkonsentoj la disvolviĝantaj landoj pligrandigis siajn kvoton kaj balotrajton en la internacia mona fonduso. La Internacia

Mona Fonduso starigis specialajn pruntedonojn por helpi ilin venki provizorajn malfacilojn. Iuj evoluantaj landoj eĉ parte nuligis ŝuldojn de disvolviĝantaj landoj.

Ĉio ĉi tio ludis utilan rolon por akceli la ekonomian disvolviĝon de la disvolviĝantaj landoj kaj malpezigi malfavoran influon kaŭzitan de la ekonomia stagnado de la kapitalisma mondo kaj certgrade altigis la pozicion de la disvolviĝantaj landoj en la monda ekonomio kaj internacia komercado.

Ĉar realigo de la nova internacia ekonomia ordo mem estas batalo de granda reformo koncernanta internaciajn ekonomiajn rilatojn, ĝi neeviteble renkontos barojn kaj malhelpojn. Precipe post kiam la mondo

eniris en la okdekajn jarojn, la internacia situacio fariĝis pli malstabla kaj la evoluantaj landoj frontos kontraŭ plimalfacila kaj malstabla perspektivo en sia ekonomio. La du elektoj — daŭrigi la malnovan ordon por servi al la akiritaj interesoj aŭ serĉi elirejon en reformado de la malnova internacia ekonomia strukturo — rezultigos du malsamajn situaciojn. Nun, nemalmultaj okcidentaj eminentuloj jam konis, ke nur revolucio de la internacia ekonomia sfero povos akceli stabilecon kaj disvolviĝon de la monda ekonomio, helpi sendependecon kaj disvolviĝon de la disvolviĝantaj landoj kaj favori al la monda paco.

*\* La aŭtoro estas instruisto de la ekonomika fakultato de la Beijing-a Universitato.*

(Daŭrigo de p. 8)

Post la manĝo mi babilis kun mia frato.

“Frato,” mi diris, “vi vivas bone. Tamen vi estas eble malpli riĉa ol nia pliĝa frato kiu laboras en Bejiĝo. Lia familio kun ses membroj enspezas ja 250 juanojn ĉiumonate.”

“Vi ludis malnovan arion sur la sama kordo,” skuis la manon mia frato. “Nun vi mem detale kalkulu. En mia hejmo estas 11 homoj, el kiuj 7 laboras en la taĉmento. Mi laboras kiel kapro-buĉisto, mia dua filo — vilaĝa kuracisto, lia edzino — tajlorino kaj la tria filo laboras en la agrikultura grupo. Ni kvar estas fortaj laboruloj. Laŭ la valoro de la jarfinaj poentoj ĉiumonate ni kvar povas enspezi 200 juanojn. Mia edzino funkciiĝas tetrinkejon kaj miaj du

filinoj sin okupas pri plantado de floroj en la taĉmento. Ili enspezas 140 juanojn ĉiumonate. Sume, mia tuta familio enspezas 340 juanojn ĉiumonate.”

“Eĉ tiel, via meznombra enspezo estas malpli multa ol tiu de la pliĝa frato,” mi kontraŭdiris.

“Ne hastu,” li ridetis, “mi devas aldoni ankoraŭ konton. Ni bredas kokojn kaj kaprojn kaj kulturadas parcelon por privata uzo, por kio ĉiujare ni enspezas almenaŭ 200 juanojn.”

Post lia klarigo mi ekkomprenis. Plus tio ilia enspezo do egalas preskaŭ al tiu de la pliĝa frato.

Poste la tria frato eksplikis al mi la kaŭzon de sia riĉiĝo. Li diris, ke ĉio ĉi estas kaŭzita de praktikado de la principo pri la produkta kontrakto kaj dono de

laborpago laŭ la produktokvanto. Antaŭe li ankaŭ buĉis kaprojn por la taĉmento, sed kiom ajn li buĉis por la taĉmento, li ricevis la saman laborpagon kiel aliaj komunumanoj, pro kio lia entuziasmo velkis. Kaj li buĉis tre malmultajn kaprojn ĉiumonate. Sed post kiam la taĉmento faris kun li kontrakton, laŭ kiu li devas kontribui ĉiumonate 24 juanojn al la taĉmento kaj la ceterajn rezervas por si mem. Tial li entuziasmiĝis kaj eklaboris de frumateno ĝis malfrua horo. ĉiutage li buĉis dekelkajn kaprojn. Ekster la difinita normo ĉiumonate li enspezas 30-40 juanojn kaj en la jarfino la taĉmento distribuis al li tiom da greno, kiom ricevis forta laborulo. . .

Mi fine komprenis de kie venis lia aktiveco.



# Konstruado kaj mastrumado de metanbaseno

*Post publikigo de la artikolo "Metano — Nova Hejtajo en Ĉina Kamparo" en la 1-a numero, 1980 de nia gazeto, ni ricevis leterojn de niaj legantoj kiuj esperis, ke ni konigos al ili la metodon pri konstruado de metanbaseno. Pro tio ni petis Xie Zhiheng, vicedron de la Oficejo de la Gvidgrupo de la Disvolvo de Metano en Ĉinio, skribi jenan artikolon.*

— La Red.

Metano estas bruligebla gaso akirebla per hermetika fermentado de organikaj materialoj en certaj temperaturo, humideco, acideco kaj alkaleco. En iuj kamparoj de Ĉinio metano jam fariĝis nova hejtajo populare uzata por kuirado, lumigado, elektroproduktado kaj funkciado de maŝinoj. Mi, invitite de la redakcio de EPĈ, estas tre ĝoja konigi alilandajn legantojn pri la konstruado kaj mastrumado de metanbaseno.

## STRUKTURO DE METANBASENO

Nun, en la ĉina kamparo estas populare uzata la hidraŭlika metanbaseno, kiu konsistas el fermentejo, gasotenejo, akvopremejo, enirejo kaj elirejo de materialoj, arko (inkl. moveblan kovrilon kaj metan-elkondukan tubon) ktp. (vidu la bildon).

La fermentejo kaj gasotenejo estas la ĉefaj partoj de la metanbaseno. La surfaco de la fermentanta likvaĵo apartigas la metanbasenon en du partojn: sube estas fermentejo kaj supre gasotenejo.

La akvopremejo estas lokita ĉe la elirejo de materialoj. Kiam grand-

kvante produktiĝas metano en la fermentejo kaj la metanpremo en la gasotenejo superas la atmosferan premon, leviĝas la akvonivelo de la enirejo kaj tiu de la akvopremejo. Kiam la metano estas utiligata, malleviĝas la akvonivelo en la akvopremejo. Rezulte de tio, metano en la gasotenejo estas tenata en certa premo. Tia metanbaseno estas nomata hidraŭlika baseno. Ĝenerale, la volumeno de la akvopremejo estas 10% de tiu de la ĉefa baseno, konforme al tiu de la gaso produktita dum 12 horoj.

Por konstrui metanbasenon kun volumeno de 5-7 kubmetroj, ĝiaj enkonduka kaj elkonduka tuboj devas havi internan diametron respektive de 20-25 centimetroj kaj 10-15 centimetroj kaj esti oblikve instalitaj ambaŭflanke de la metanbaseno. La enkonduka tubo devas esti lokita en la malsupra parto de la basenmuro kaj la elkonduka en la supra parto.

La arko estas supra ŝelo de la gasotenejo. La proporcio inter ĝiaj alto kaj diametro estas 1:4 aŭ 1:5. Por garantii ĝian fortikecon oni devas firmigi ĝiajn piedojn en la

projktado. La movebla kovrilo estas lokita sur ĝia centro kaj servas por tralasi aeron kaj lumon dum riparado de la metanbaseno kaj ŝanĝo de materialoj. Ankaŭ kirlilo estas instalita sur la movebla kovrilo.

La metan-elkonduka tubo estas lokita supre de la arko, aŭ sur la movebla kovrilo. La diametro de la metan-elkonduka tubo por la metanbaseno de 5 aŭ 7 kubmetroj devas esti 0.8 centimetro kaj ĝia longeco — duoblo de la dikeco de la arko aŭ movebla kovrilo, kaj ĝia fino, lokita interne de la metanbaseno, devas sin etendi 2 centimetrojn eksteren por redukti la akvoproporcion kunportitan de metano en la tubon.

## POSTULOJ DE LA KONSTRUADO

La metanbaseno devas esti konstruita sur pli alta loko sunfronta kaj ventoŝirma kun fortika tero kaj malalta situo de subtera akvo. Por oportunigi la eniradon de la ekskremento, pli multe produkti metanon kaj purigi la medion, la baseno devas esti interligita kun nece-

sejo kaj stalo. Kaj krome la distanco inter la baseno kaj la kuirejo ne devas superi 30 metrojn.

Estas pli bone fari basenon cilindra aŭ globa, ĉar tia baseno pro la egala premo de la ĉirkaŭo estas fortika, tenas egalan premon kaj faciligas kirladon. En la kamparo de suda Ĉinio, 6-kubmetra baseno jam sufiĉas por kuirado kaj lumigado de kvarpersona familio.

La konstru-materialoj de la baseno povas esti brikoj, ŝtonoj, antaŭpremitaj betonaĵoj aŭ cemento.

La metanbaseno devas esti konstruita senpaŭze. Unuvorte, la konstruita baseno nepre devas esti fortika, hermetika, lik-imuna kaj ne-tralasantata aeron.

## LA KONSTRUADO DE BETONA METANBASENO

La cementita metanbaseno kun maldika muro estas strukturita kompakte kaj hermetika bone. Ĝi bezonas malpli da materialoj kaj laborfortoj. Por konstrui tian basenon, oni devas unue zorge fari fosaĵon por la basenkorpo. Ekz. por konstrui la 6-kubmetran cilindran metanbasenon, ĝiaj ekstera kaj interna diametroj devas esti respektive 208 cm. kaj 200 cm. t.e. la dikeco de la muro estas 4 cm., la profundeco de la baseno devas esti 220 cm., la alteco de la muro estas 150, cm., tiu de la arko estas 40 cm. kaj la dikeco de la tero kovrita sur la arko estas 30 cm. La volumeno de la akvopremejo devas esti 10% de tiu de la baseno kaj ĝia fundo devas esti sur la sama nivelo kun la surfaco de la fermentaĵo.

La konstrua procedo de la betona metanbaseno estas: Unue konstrui la fundon, poste la muron kaj laste la arkon. La ŝlosilo en la konstruado de la metanbaseno estas muldilo. Iuj muldiloj estas lignaj, aliaj ŝtalaj kaj pli popularaj estas brikoj. La brika muldilo estas facile konstruebla kaj malmuntebla, kaj 300 brikoj jam sufiĉas por fari ĝin. La konstruado devas esti farita de la bazo

ĝis la supro. Masoninte muldilon per brikoj, oni enmetas en ĝin betonon. Finmasonita la muldilo devas esti malmuntita post unu horo en somero kaj post plena tago en vintro.

La betona muro dikas 4 centimetrojn, la arko 6-7 centimetrojn kaj la fundo 5 centimetrojn. Se la tero de la fundo estas loza, oni devas unue ĝin plifortikigi per rulŝtonetoj kaj poste cementi ĝin je 5 cm.

Por diferencaj partoj de la baseno devas esti uzata betono kun malsamaj proporcioj de cemento, sablo kaj ŝtonetoj: por la fundo kaj muro, la proporcio de cemento, sablo kaj ŝtonetoj devas esti 1:4:8, por la arko inkl. la moveblan kovrilon 1:3:6, kaj por la fundo 1:3:4.

Post cementado de la baseno, oni devas atente ŝmiri ĝian internon inkluzive la akvopremejon, kio estas ŝlosilo por la hermetikeco de la baseno. Antaŭ ĉio oni devas cementi la fendojn kaj poste ŝmiri la tutan basenon per mortero kun proporcio de cemento kaj sablo 1:2 aŭ 1:3. Unuafoje la stuko devas esti dika je 1 cm. kaj plurfoje glatigita. Apenaŭ la stuko solidiĝis, oni devas duafoje ĝin stuki per pli bona mortero kaj ĉifoje la stuko devas esti malpli dika, tamen pli firma kaj pli glata. Ĝia arko povas esti preme glatigata per boteloj. La triafoja ŝmirado similas al la duafoja. Fine oni devas stuki la gasotenejon kaj aliajn ŝlosilajn partojn per pure cementa mortero. Se la kondiĉoj permesas, oni povas stuki ĝin per koloraj ŝmiraĵoj ankoraŭ 1- aŭ 2-foje.

La finkonstruita metanbaseno devas esti zorge kovrita por ŝirmi ĝin de pluvo, sunlumo, prujno kaj tremado. Tiamaniere post certaj tagoj, oni povas provi ĝian elteneblecon de premfortoj kaj likimunecon.

Antaŭ la provado, oni devas ekzameni la internon de la metanbaseno por koni: Ĉu estas sabla truecto? Ĉu troviĝas lika postsigno sur


la arko? Ĉu okazis krevo sur la tavolo stukita? Se ne estas manko, oni povas ĝin ekzameni per akvo aŭ aero.

Oni unue devas enmeti pajlojn en la enirejon de la materialoj (por ke la akvo ne damaĝu la fundon de la baseno) kaj poste enverŝi akvon tra la enirejo (samtempe malfermi la moveblan kovrilon) ĝis kiam la akvonivelo superas la angulon de la arko. Tiam oni devas mezuri la altecon de la akvo, kaj post 12 horoj rigardi, ĉu la akvonivelo malleviĝis aŭ ne. Se ĝi malleviĝis, oni devas daŭre enverŝi akvon ĝis kiam ĝi atingos sian originalan nivelon. Post aliaj 12 horoj, oni devas refoje rigardi. Se la nivelo malleviĝis, tio pruvis, ke la baseno likas. Tiam oni devas elĉerpi la akvon por ripari likojn.

Certiginte ĝian likimunecon, oni devas ekzameni, ĉu ĝi tralasantata aeron aŭ ne. Oni devas unue mallevi la akvonivelon ĝis la loko je 20 centimetroj supre de la elirejo de materialoj, firme kovri la moveblan kovrilon per glueca tero, enverŝi akvon je profundeco de 20 centimetroj en la hermetikan fermilon, instali la aertubon, kranon kaj manometron, kaj poste, malrapide enverŝi akvon (aŭ enblovi aeron) tra la enirejo ĝis kiam la akvokolono en la manometro leviĝas je 10 cm. Post ĉiu kvaroj da horoj oni devas ĝin rigardi kaj enverŝi akvon. Tiamaniere post la 5-foja enverŝado de akvo, se la akvokolono en la manometro ne malleviĝis, tio pruvas ke ĝi ne tralasantata aeron. Se la manometro malleviĝis 2 aŭ pli ol 2 fojojn en la ekzameno, do tio pruvas, ke ĝi tralasantata aeron. Tiam oni devas unue ekzameni, ĉu la metan-elkonduka tubo kaj kunligitejoj tralasantata aeron. Se ne, oni devas ekzameni la gasotenejon kaj ripari ĝin per la sama materialo uzata en la konstruado. Post la finriparado ĝi devas esti tenata en bona flegado, kaj fine denove ĝin ekzameni ĝis kiam ĉio estas en ordo.



- 1 necesejo
- 2 ekskremento
- 3 herbo
- 4 akvo
- 5 enirejo
- 6 tubo
- 7 metana baseno
- 8 fermentejo
- 9 gasotenejo
- 10 elirejo
- 11 fermentaĵejo
- 12 movebla kovrilo
- 13 metan-elkonduka tubo
- 14 hermetika fermilo per akvo
- 15 kaŭĉuka tubo por metano
- 16 manometro
- 17 lumigado per metano
- 18 kuirado per metano
- 19 senŝeligo de rizo per metano
- 20 elektro-produktado per metano
- 21 ekskremento-pumpilo
- 22 metana sterko



SKIZO DE METANA  
BASENO KAJ UTILIGO  
DE METANO

### MASTRUMADO DE LA METANBASENO

Se la ekzamenado pravas, ke la nove konstruita baseno tralastas nek akvon nek aeron, oni povas uzi ĝin por produkti metanon.

10% de la materialoj por produkti metanon konsistas el herboj, 10% el pajloj, 30% el fekaĵoj de homoj aŭ brutoj, kaj 50% el akvo. Post unu semajno de fermentado, komencas produktiĝi metano kaj tuj sekve aperas alta tajdo de gasoproduktado. Post pli ol unu monato, la kvanto de la produktita gaso iom post iom malmultiĝas. Tiam oni devas regule enmeti novajn materialojn por teni la gasoproduktadon en stabileco. Se la metanbaseno ligiĝas kun necesejo kaj stalo, kaj la fekaĵoj de homoj kaj brutoj kontinue fluas en la fermentejon, oni do devas enmeti nur fermentintajn herbojn, pajlojn kaj malmulte da akvo. La kvanto de la pliigitaj materialoj estas rekte proporcia al tiu de la foruzita metano. Laŭ la postulo de agrikultura

produktado pri sterko, la fermentaĵoj en la metanbaseno devas esti komplete ŝanĝitaj 2- aŭ 3-foje ĉiujare.

Por ke la baseno regule produktu metanon, oni ankaŭ devas ofte kirli la fermentigitan likvaĵon kaj ĉiam teni ĝin en konvenaj temperaturo, acideco kaj alkaleco. Oni povas ĝustatempe scii la staton pri gasoproduktado sur la manometro.

Metano povas esti uzata en kuirado kaj lumigado. La plena brulado de metano postulas sufiĉan aeron. La eksperimento pruvis, ke unu kubmetro da metano postulas 7 kubmetrojn da aero por sia plena brulado. Tial, ĉe gasbeko de la forno kaj lampo devas esti granda truo por ke la ŝprucigita metano kunportu sufiĉan aeron en la fornon kaj lampon por brulado.

### ATENTIGOJ EN UZADO DE METANO

Ĝenerale metano estas senvenena gaso, tamen se aero entenas tro multe da metano, ĝi povas sufoki

homojn. Tial antaŭ forigo de la rekremento kaj riparado, oni nepre devas komplete eligi metanon el la baseno. En la domo kie estas uzata metano oni devas ofte malfermi la fenestrojn por ke la aero en ĝi estu freŝa. Estas absolute malpermesite ĵeti ĉian ajn oleon restaĵon en la basenon, ĉar tio naskas venenan fosfoidon PH<sub>3</sub>.

Se la metana denseco en aero atingis certan gradon, ĝi facile eksplode ekbrulas je tuŝo de fajro. Tial, estas absolute malpermesate fumi kaj bruligi apud la baseno kaj per fajro pruvi la ekziston de metano ĉe aperturo de la tubo. Dum ekzamenado kaj riparado al la baseno estas ankaŭ malpermasata ia ajn fajro kaj fumado en ĝi.

Metano estas brulema gaso, tial oni devas atenti preventadon de gasotralaso kaj meti nenian facile bruligeblan objekton apud la lampo kaj forno. Se okazas brulego, oni devas unue fermi la kranon aŭ ĉesigi la fluon de metano antaŭ ol estingi ĝin.



# Menuhin kaj liaj ĉinaj lernantoj

de CHEN YINGNAN

**F**RUUVINTRE de 1979 la monde fama majstro-violonisto Yehudi Menuhin faris 10-tagan turneon en Ĉinio, kio impresis la ĉinan popolon neforgeseble. Ĉiu, kiu havis kontakton kun li, estis sorĉita de lia arto kaj admiris liajn noblajn kvalitojn.

S-ro Menuhin havas amikan senton apartan por Ĉinio. Li kaj lia edzino Diana longe deziris rigardi pejzaĝojn de Ĉinio kaj viziti ĝian diligentan popolon. Sed tuj post kiam li atingis Ĉinion kaj informiĝis pri la stato de ĝia muzikistaro, li

decidis servigi sian viziton al fakaj aktivecoj.

De la dua tago post sia veno al Ĉinio li partoprenis en provludo, prezentado kaj kunsido de la Centra Filharmonio de Ĉinio, prelegis en muzikaj lernejoj kaj instruis sian teknikon al violonfaristoj de la Beijing-a Muzikila Fabriko. Por kontentigi la ardan deziron de milo da violonistoj kolektiĝintaj en Beijing ricevi lian instruon, li plurfoje danke rifuzis la inviton por vizito al pitoreskejo kaj teatro. Eĉ en la sola fojo, kiam li vizitis la Imperietran Palacon kaj la Grandan Muron, nemalmultaj lernemaj gejunuloj lin konsultis.

S-ro Menuhin multe zorgis pri la progreso de la arto de violonado de

Ĉinio kaj pri la kresko de ĝiaj junaj violonistoj. Li ĝojis pro multiĝo de espereblaj ĉinaj violonistoj. Li proponis, ke Ĉinio sendu siajn lernantojn por viziti la muzikan akademion kaj lernejon, kiujn li fondis.

La de li elektitaj studentoj de la Centra Konservatorio de Ĉinio Jia Hongguang kaj Zhang Leyi, kaj elstara violonistino de Shanghai Tang Yun nun estas studentaj en la Internacia Muzika Akademio de Menuhin en Svisio. Ankaŭ lernanto de la dependa elementa lernejo de la Shanghai-a Konservatorio Jin Li kaj lernanto de la Deko Elementa Lernejo de la urbo Urumqi Chen Xiang vizitas la Lernejon de Y. Menuhin en Londono.

La lernejo situas en kvietaj pitoreskejo en malproksima antaŭurbo de Londono. Ĝin vizitas pli ol 40 8-18-jaraj geknaboj el Nederlando, Francio, Usono, Japanio, Hindio kaj aliaj landoj. Ili havas regulajn lernadon kaj vivon. La instruistoj kaj lernantoj vivas harmonie kvazaŭ samfamilianoj.

La 18-an de septembro 1980, kiam Jin Li kaj Chen Xiang venis al la lernejo, ĝi tuj ekbolis. Ilin varme bonvenigis la instruistoj kaj lernantoj. La ĉefflegistino, ŝargita per zorgado pri la vivo de la lernantoj kaj loĝanta najbare de ilia litĉambro, donis al ili apartan zorgon. Por ke tiuj du knaboj vivantaj fore de la patrolando havu agrablan vivon, la lernejo bredis kuniklojn, anseridojn, hundetojn kaj cervidojn por ilia distriĝo. Iu knabino el Taiwan tenis sin aparte intime al ili. Ŝi akompanas ilin por rigardi la lernejan ĝardenon. Ŝi ankaŭ lerni-

*Dum sia vizito al Ĉinio s-ro Menuhin demonstras ludadon al violonistino Zhang Leyi.*





gis al ili la anglan lingvon kaj helpis ilin ordigi la litĉambron.


Post kelkaj monatoj, s-ro Menuhin aŭskultis ilian violonadon. Li mire ĝojis pro ilia progreso kaj donis al ili konsilojn. Li estis en granda okupiteco, tamen li donis foje lecionon al ili. Li ne nur demonstris violonadon kaj analizis verkon, sed preskaŭ dancante ludis violonon por komprenigi al ili ĉiun lud-movon. Tiu blankhara majstro elspezis du kaj duonan horojn por instrui la du ĉinajn lernantojn, kio tre kortuŝis la ĉeestantojn.

Laŭ diferencaj apartaĵoj de Jin Li kaj Chen Xiang, s-ro Menuhin ellaboris malsaman planon por ilia lernado. La lernejo havigis al Jin Li junan japanan instruiston por lia ĉefa studobjekto kaj al Chen Xiang britan fraŭlinon por la samo. La du instruistoj havas perfektan arton de violonado kaj riĉan sperton de instruado. Ili laboris tre pacience. La instruantoj kaj la instruatoj ĉiuj sin montris kontentaj pri la duonjara praktiko.

Krom lecionoj de violonado Jin Li havas ankaŭ kursojn de muzika teorio, harmonio, pianado, solfeĝo, la angla lingvo, matematiko kaj populara scio. Estas laŭdirinde, ke s-ro Menuhin postulis ke la geknaboj de tiu lernejo bone lernu kiel muzikon tiel ankaŭ sian gepatran lingvon, estu lojalaj al sia patrolando kaj ĝin glorigu. Por solvi la problemon pri ilia lernado de la gepatra lingvo, li diskutis plurfoje kun koncernaj ĉinaj respondeculoj.

Jin Li progresis ne malrapide en sia lernado. Liaj instruistoj trovis, ke li posedas apartan talenton pri muzika sento. Nun li provludas malfacilan verkon por prezentado en studenta koncerto okazonta ĉi-prin-tempe.

Chen Xiang aĝas apenaŭ 10 jarojn. S-ro Menuhin laŭdis lin pri lia talento en violonado, forta muzika sento, vigla karaktero kaj fortika korpo (tiu lasta estas unu el la



*S-ro Menuhin (la dua de dekstre malantaŭe) kaj Jin Li (la maldekstra en la fronto) kaj Chen Xiang (la dekstra en la fronto) en Londono*



*S-ro Lysy (la meza), Jia Hongguang (la maldekstra) kaj Zhang Leyi en Svisio*

gravaj kondiĉoj por glate plenumi ludon de granda muzika verko) Sed lia vigla karaktero faris lin ofte nepovanta koncentri la atenton. Ĝuste pro tiu lia manko, s-ro Menuhin kaj aliaj muzikistoj postulis, ke li pli multe sin ekzercu pri fundamentaj teknikoj, kaj ke liaj instruis-

toj konstante variigu la enhavon de instruado kaj uzu humurajn lingvaĵojn kaj interesajn gestojn por absorbi lian menson. La praktiko jam rikoltis bonan efikon.

La Internacia Muzika Akademio de Menuhin, kiun vizitas Jia Hongguang kaj Zhang Leyi, havas lokon

en Gstaad proksime de Berno, Svisio. Ĝiaj domoj staras ĉe piedo de la ĉiam neĝkovritaj svisaj Alpoj. Tie studas la 18-30-jaraj gejunuloj elektitaj de s-ro Menuhin en diversaj partoj de la mondo. Ili ĉiuj havas talenton por muziko, kaj iuj el ili jam debutis en la muzika scenejo. Ankaŭ la instruistoj de la akademio estas famaj specialistoj. En ĉiu trimestro s-ro Menuhin venas al la akademio por mem doni lekciojn, direkti ĝian orkestron kaj konduki kelkfoje instruistojn kaj studentojn al diversaj landoj por prezentado. La akademio karakteriziĝas per tio, ke ĝiaj instruistoj praktikas rigoran instruadon kaj ĝi donis grandan atenton al prezentado de la studentoj por solidigi kaj perfektigi la lernitajn sciojn de la studentoj.

S-ro Menuhin kaj lia akademio donis plenan zorgon al la studentoj el Ĉinio. Antaŭ ol Jia Hongguang kaj Zhang Leyi atingis Svision, s-ro Menuhin, kiu estis tiam en Parizo, postulis, ke lia sekretariino f-ino Eleanar Hope kaj respondeculo de

la akademio veturu respektive de Londono kaj Gstaad al la aerodromo de Zuriko por ilin bonvenigi. Jia kaj Zhang jam estis plenkreskuloj, tamen f-ino Hope, komisiite de s-ro Menuhin, insiste akompanis ilin al la akademio kaj faris ĉiujn aranĝojn antaŭ ol reveni al Londono.

La akademio tre zorgis pri la studo de tiuj du ĉinaj studentoj: Ĝi havigis al ili po unu instruiston por la ĉefa leciono de violonado kaj unu anglalingvan instruiston kaj aranĝis por ili kursojn pri pluraj muzikaj teorioj.

Por ke Jia Hongguang akiru sukceson en la Internacia Violona Konkurso de Jean Sibelius, s-ro Alberto Lysy, fama violonisto kaj estro de la akademio, donis al li apartan direktadon. Dank' al tio, Jia Hongguang, kiu unuafoje partoprenis en internacia konkurso, sukcese eniris en la duan rondon de la konkurso.

Dum sia vizito al Ĉinio s-ro Menuhin tre admiris junan violo-

nistinon Tang Yun de la Shanghai-a Filharmonio, esperante, ke ŝi vizitos la muzikan akademion en Svisio. Post nelonge ŝi veturis al Usono por studi tie per sia propra pago. En la pasinta jaro s-ro Menuhin vizitis Usonon, kie li renkontiĝis kun ŝi. Fine ŝi akceptis lian proponon kaj decidis viziti la akademion. S-ro Menuhin vere estas majstro amanta talentulojn.

Dum pli ol unu jaro la kvin ĉinaj lernantoj rapide progresis en sia lernado, dank' al helpado de siaj instruistoj kaj fervora zorgado de s-ro Menuhin. En siaj leteroj al prezidanto de la Ĉina Muzikista Asocio Lü Ji kaj ĝiaj aliaj respondeculoj, s-ro Menuhin montris sian kontenton pri tiuj lernantoj. En unu el tiuj leteroj li skribis: "La geknaboj refoje konkeris niajn korojn. Ili ankaŭ 'forkaptis' la korojn de la lernejoj instruistoj kaj oficistoj. Vi tute ne bezonas atentigi, ke ni estu rigoraj al ili, ĉar ili jam estas tre rigoraj al si mem. Vi ja devas fieri pri tiuj muzikaj 'senditoj'."

LIU QIANQIAN\*:

*Ne demandu,  
pro kio estas tio*



*Panjo donis al mi du flauinojn,  
kaj mi kaŝe rezervis unu.  
Ne demandu, pro kio estas tio.*

*Paĉjo vestis min per vatita jako,  
kaj mi nepre gardos ĝin de ŝiriĝo.  
Ne demandu min, pro kio estas tio.*

*Fraĉjo donis al mi skatolon kun kantfolioj,  
mi elektis el ili la plej belan.  
Ne demandu, pro kio estas tio.*

*Vespere, mi metis ilin ĉe la kapkusenon,  
por ke sonĝo rapide elflugu el mia litkovrilo.  
Ne demandu, pro kio estas tio.*

*Mi donos la kukon al ŝi por manĝi,  
kaj la vatitan jakon por ŝin ŝirmi de neĝvento,  
kaj ni kunkantos la plej belan kanton.*

*Ĉu vi volas scii, kiu estas ŝi?  
Demandu avon Andersen —  
ŝi estas la fratino vendanta alumetojn.*

Elĉinigi ARMAND SU

\* La verkinto estas 9-jara knabo de la tria klaso de la Elementa Lernejo Dongfanghong en la ĉirkaŭurbo de Echeng, Hubei-provinco. Li gajnis, per tiu ĉi poemo, premion en monda poezia konkurso de infanoj okazinta en 1980.

# Yan Ying\* en Chu-regno

(Ĉina Antikva Spritaĵo)

Pentrita de JIN JIEZHONG



YAN Ying, altrangulo de Qi-regno, venis al Chu-regno kiel sendito de sia regno. Ĉar li estis nano, Chu-anoj aparte faris por li pordecon apud la pordego de la palaco. Kiam oni petis Yan Ying tie eniri, li rifuzis tion, dirante:

“Tiu, kiu estas sendita al hunda regno, devas eniri tra hunda pordo. Nun mi venis al Chu-regno kiel sendito, do mi devas eniri ne tra hunda pordo.”

La reĝo de Chu-regno demandis lin: “Ĉu Qi-regno ne havas alian taŭgan personon por esti sendito al nia lando?”

Yan respondis: “En nia ĉefurbo Linzi la manikoj de la loĝantoj povas

formi grandan tendon. Kiam ili mane viŝas al si ŝviton, la ŝvitgutoj falas kiel pluvo. Kiel vi povas diri, ke ĝi ne havas homojn? Nia ŝtato sendas eminentulojn kiel senditojn al eminentaj reĝoj kaj sentaŭgulojn al sentaŭgaj reĝoj. Mi estas sentaŭgulo, tial mia reĝo sendas min al regno de via reĝa moŝto!”

Post kiam Yan Ying sidiĝis, subuloj de la reĝo enkondukis ligiton. La reĝo demandis:

“Kiu estas tiu?”

La subuloj respondis: “Li estas Qi-ano kaj arestita pro ŝtelo.”

Ĵetinte rigardon al Yan Ying, la reĝo demandis: “Ĉu Qi-anoj estas lertaj en ŝtelado?”

Yan respondis: “Mi aŭdis, ke la mandarinoj en norda lando estas acidaĵ, sed tiuj en suda lando dolĉaĵ. Iliaj folioj estas samaj, sed la gustoj diferencaj. Tio kaŭziĝas de la malsamaj grundoj! Tiu ĉi ne estis ŝtelisto en Qi-regno, sed li ŝtelis en Chu-regno. Ĉu ne la grundo de via lando faris lin ŝtelisto?”

La reĝo ridis embarasite:

“Mi kaŭzis al mi mem la honton.”

\* Yan Ying estis altrangulo de Qi-regno dum la Periodo de Prin-tempo kaj Aŭtuno (722-481 a.K.), li ofte iris al aliaj landoj kiel sendito de Qi-regno.


Soltrunka ponto



Papertondajo de JIANG SHUPU kaj WANG BIN







## Baldaŭ pariĝu la blankaj simioj

**S**IMIOJ estas ofte videblaj, tamen blankaj simioj estas tre raraj. Post kiam unu blanka simio ekloĝis en la simi-bredejo de la Kunming-a Zoologia Instituto de Ĉinio antaŭ du jaroj, de tempo al tempo venis tien rigardantoj kaj sciencistoj. Oni nomis la belan blankan simion Nan Nan. Antaŭ nelonge mi havis ŝancon viziti ĝin kaj akiris informon pri ĝi de la bredisto Bai Shouchang.

Antaŭ dudek jaroj Bai Shouchang diplomitiĝis en brutkultura fakultato de agronomia instituto kaj de tiam li okupiĝis pri esplorado kaj bredado de simioj. Kiam li kondukis min al la simio en kaĝo, mi vidis, ke la maskla blanka simio kviete sidas sur tabuleto kaj kombas al si la blankajn harojn, kiuj estas pli longaj ol tiuj de la ordinara simio kaj aspektas malkompaktaj kaj molaj. Ĝiaj vizaĝo, manoj kaj piedoj havas blankan koloron kun rimarkebla ruĝo. Kiam ĝi rimarkis, ke ni proksimiĝas al ĝi, ĝi tuj starigis siajn orelojn. Ĝiaj brilaj okuloj plej interesas la rigardantojn.

Nan Nan estas milda kaj aminda kaj inteligenta. Ĝi ofte sidas silente sur la tabuleto, rigardante ĉirkaŭen. Tuj kiam la bredisto malfermis la

pordon, ĝi saltis al li por preni lian manon aŭ ĉirkaŭbrakumi liajn piedojn; jen ĝi ĵetis sin en lian sinon, jen ĝi grimpis sur liajn ŝultrojn. Ĝi obeeme plenumis ordonojn de Bai, iri sur drato, eskaladi ktp. Kvankam ĝi grimpas kaj saltas ne tiel lerte, kiel ordinara simio, tamen ĝi estas aminda pro siaj mallertaj kaj naivaj movoj similaj al tiuj de malgrandaj pandoj. Ĝi eĉ falis kelkfoje dum sia irado sur drato 3 metrojn longa, kio ridigis la rigardantojn.

K-do Bai diris al mi, ke la hejmloko de la blanka simio estas en la arbaroj de la supra baseno de Changjiang-rivero, je pli ol 2,000 metroj super la marnivelo. En iu tago de majo 1979, kiam kelkaj kampuloj de Ji-nacieco laboris sur montodeklivo, ili trovis ĝin inter ĉ. cent simioj. Ili kaptis ĝin kaj portis hejmen por breedi. Konsiderante, ke la blanka simio havas sciencan valoron kaj estas malfacile trovebla en la mondo, ili donacis ĝin al la Kunming-a Zoologia Instituto. Pro ilia faro laŭdinda, la ŝtato premiis ilin per sumo da mono. Bai diris ankaŭ, ke simioj estas altklasa animalo por eksperimentado pri la primata biologio. Ili havas multan

similecon al la homoj ekologie kaj fiziologie. Ili estas parencaj al la homo. Iuj science evoluintaj landoj starigis esploran centron aŭ institucion por esplori primaton. En la lastaj jaroj oni studis simion kiel esploran objekton kaj akiris iujn sukcesojn en esplorado pri apero de kancera tumor, pri patologio, altituda fiziologio kaj nerva fiziologio, homnasko kaj kardiovaskula malsano. Simioj estas des pli vaste uzataj por fari vakcinan produktadon kaj eksperimenti la toksecon de medikamentoj. La blanka simio estas utila ne nur en la supre menciita esplorado, sed ankaŭ havas specialan valoron en genetiko kaj biologio. Sciencistoj opinias, ke troviĝas iu sama kaŭzo inter la simia kaj homa albinismo. La blanka simio servas kiel objekto por esplori, kial okazas albinismo kaj kiel oni povas preventi kaj kuraci ĝin. Tial sciencistoj tre zorgas pri multigo de specioj de simioj, precipe tiu de la blanka simio. En la nuna mondo troviĝas nur du bredataj blankaj simioj, kaj la alia estas femala en Taiwan. En la nunaj kondiĉoj troviĝas tre malgranda ebleco por fari senseksan generadon per unu blanka simio, kaj kvankam troviĝas ebleco generi blankan simion per hibrido, tamen tio povas doni frukton eble post du aŭ tri generacioj, t.e. post ĉ. 10 jaroj. Tial la plej dezirinda metodo estas pariĝi ambaŭ blankajn simiojn ke ili nasku idon. Por tiu celo la estro de la Kunming-a Zoologia Instituto deklaris, ke la instituto volas edzigi sian blankan simion al tiu de Taiwan, por kune fari sciencan esploron.

de WANG ZHIXUAN





## “Reĝo de Tapiŝo”

Nun giganta tapiŝo kun florde-segnaĵo estas teksata de la tapiŝo-farejo de la urbo Urumqi, la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono en la nordokcidenta limregiono de Ĉinio.

La tapiŝo longas je pli ol 27 m. kaj larĝas je 16 m. Ĝi estas farata speciale por la Xinjiang-a Ĉambro en la Popola Halo de Beijing. Tiel grandan tapiŝon Xinjiang neniam produktis antaŭe, kaj pro tio oni titolas ĝin “reĝo de tapiŝo”.

Sur ĝia malhele bruna fono brilas belaj desegnoj kun okpetala floro kun diametro de 1.6 metroj en la centro, kio intensigas la lokan koloron de Xinjiang.


I tuno da ŝaflano estos bezonata por fari la tapiŝon. La farejo preparis specialan grandan ŝtalframon, ĉe kiu teksas 50 diversnaciecaj laboristinoj en du skipoj. Ili komencis la teksadon en la komenco de oktobro, 1980 kaj laŭplane ili finos la taskon en aprilo de la kurranta jaro.

## Tradicia metiartaĵo — blua katuno

En la ĉina kamparo virinoj ŝatas porti vestojn, antaŭtukojn kaj kap-tukojn el blua katuno. La tolo kun blanka desegnaĵo sur blua fono estas tradicia metiartaĵo de nia lan-

do kaj krome ĝi havas grandan debiton en la internacia merkato.

La katuno originis de la indiĝena helblua kalikoto. Komence ĝi, vakse tinkturita, aperis en Handinastio (206 a.K.—220 p.K.). Oni fandis vakson blankan aŭ flavan aŭ aliajn kontraŭtinkturajn materialojn kaj ŝmiris tolon kaj silkaĵon per la fanditaĵoj kaj post tio oni tinkturis la ŝtofon. Fine oni purigis la ŝtofon per bolanta akvo, tiel ke klare montriĝis la flordeseĝoj. En Songdinastio (960-1279 p. K.) pli populariĝis tia ŝtofo. En la 13-16-a jc., tia katuno kiel metiartaĵo furoris tra nia tuta lando. Ĝi estis multe ŝatata de la vastaj popolamasoj pro tio, ke ĝia kolorigado estis nur unufoja, ĝia



produktado facila, ĝia kosto malmulta kaj ĝia koloro longe daŭra.

La katunaj desegnaĵoj ĝenerale prezentas birdojn, fiŝojn, florojn, arbojn, fruktojn, naturajn pejzaĝojn, belulinojn ktp, inter kiuj mandarenaj anasoj (*Aix galericulata*) kaj lotusfloroj simbolas amon kaj harmonion de la geedzoj, fingraj citronoj, persiko kaj granato — feličon kaj longan vivon, fenikso kaj peonio — riĉecon, vinbero kaj sciuro — abundan rikolton ktp. Tiuj desegnaĵoj esprimas la ĝojon kaj belan idealon de la popolo. Nun, kiam la

maŝinteksita ŝtofo multe produktiĝas, tiu metiartaĵo — blua katuno ankoraŭ havas certan debiton kaj estas daŭre ŝatata de la popolo.

## La blanknaĝila delfeno hodiaŭ

En la rubriko “Kalejdoskopio” en la n-ro 8, 1980, ni raportis al la legantoj blanknaĝilan delfenon, raran mamulon kaptitan de nia lando. Eble multaj el la legantoj tre zorgas pri ĝia nuna stato. Tiu blanknaĝila delfeno, nomata Qiqi, pligrasiĝis de 36.5 kg. al 52.25 kg. dank’ al la zorgema bredado unujara. En la bredejo ĝi vivas tre bone, jen naĝas sagrapide, jen ludas surdorse.

Qiqi manĝas kun bona apetito kaj englutas fiŝojn en tuto. Ĝiaj ekskrementoĵoj estas kotsimilaj. Ĉiufoje kiam ĝi aŭdas la paŝbruon de la bredisto ĉe la cisterno, ĝi tre rapide alnaĝas kaj petas nutraĵon, balancante siajn kapon kaj voston, kio tre plaĉas al la rigardantoj.

Ĝia sango tre similas al tiu de aliaj teraj mamuloj, precipe la formoj de la sangaj ĉeloj. Per observo de la subtila ŝanĝiĝo de la elementoj en la sango de la delfeno oni povas koni ĝian fiziologian ŝanĝiĝon. Ĝia temperatur-reguliga kapablo estas bona. Ĝia temperaturo ĉiam estas ĉ. 36°C ĉu en vintro aŭ en somero. La ultrasonaj bildoj de ĝiaj cerbo, pulmo, veziko k. a. tre similas al tiuj de la sanaj homoj. Tamen ĝia kardiogramo multe diferencas de tiuj de homoj kaj aliaj mamuloj.

Laŭ la nunaj materialoj ni scias, ke la plej granda aĝo de blanknaĝila delfeno povas atingi 30 jarojn. Nun Qiqi estas nur ĉ. 3-jara. Dum sia vivo ĝi certe servos kiel valora materialo por la scienca esploro de nia lando pri la dolĉakva delfeno.

## LA ŜTATA AĈETA PLANO DE GRENO SUPERPLENUMITA

La nomita plano de la jaro 1980 estis superplenumita. Laŭ statistiko, la kvanto de la greno enportita en la ŝtatajn grentenejojn superis tiun en la plano je 4.3%.

En la lasta jaro iuj regionoj de Ĉinio suferis de gravaj plagoj, kaj tie la ŝtato aĉetis malmulte da greno. La popolaj registaroj de tiuj lokoj faris bonan aranĝon por la vivo de la plagitaj kamparanoj. La ŝtato aĉetis plimulte da greno en la riĉrikoltaj regionoj. En Liaoning, Guangdong, Guangxi kaj Henan la ŝtato aĉetis grenon superplane je preskaŭ miliardo da kilogramoj.

## LA BONSPECIOJ DE SEMOJ VASTE UZATAJ

Lastjare, en kvinono de la ĉinaj agroj estis uzitaj altproduktaj bon-speciaj semoj, kiuj pliproduktis grenon je 10-30%. Ankaŭ la semoj por aliaj agroj estis renovigitaj.

Post la fondiĝo de la Ĉina Semo-kompanio en 1978, fondiĝis sinsekve ĉirkaŭ 2,000 semo-kompanioj en la tuta lando. Tio pretigis kondiĉojn por disvastigi bon-speciajn semojn. La Ĉina Semo-kompanio starigis laborajn kontaktojn kun pli ol 100 semo-kompanioj de pli ol 30 landoj kaj importis modernajn ekipaĵojn de semo-prilabora fabriko.

## LOĜDOMOJ DE 78,000,000 KVADRATAJ METROJ KONSTRUITAJ

Laŭ nekompleta statistiko de koncerna institucio, lastjare konstruiĝis

loĝdomoj de 78,000,000 kvadrataj metroj en urboj kaj industriaj kaj minejaj lokoj en Ĉinio. Se ĉiu familio kun kvar membroj ricevas apartamenton de 50 kvadrataj metroj, tiuj novaj loĝdomoj povas kontentigi bezonon de 1,560,000 familioj. De 1949 ĝis 1979 ĉiujara meznombra investo por loĝdomkonstruado estis nur 6.8% de la totala investo por la tutlanda fundamenta konstruado. Sed en 1979 tiu investo leviĝis al 14.8% kaj en 1980 20%.

## LA UNUA KONTENERA FABRIKO DE ĈINIO

La unua kontenera fabriko de Ĉinio — la filia kontenera fabriko sub la Guangzhou-a Ŝipfarejo estis jam finkonstruita.

Ĝi havas areon de 38,000 kvadrataj metroj kaj produktas speciale ferajn kontenerojn de 20 × 40 futoj. La fabriko havas kvar aŭtomatajn produktajn liniojn kaj jare produktas 10,000 kontenerojn.

En junio de 1979 oni komencis konstrui la fabrikon en formo de kompensa komercado, post kiam la Guangzhou-a Ŝipfarejo kontraktis interkonsenton kun iu kompanio de Xianggang (Hongkong) kaj iu usona kompanio en februaro de la sama jaro.

## YUANSHUI-RIVERA ŜOSE-PONTO FINKONSTRUITA

La dua granda ŝosea ponto de Hunan-provinco — Chenxi-a Yuanshui-rivera Ŝose-ponto finkonstruiĝis kaj malfermiĝis al trafiko lastatempe. La ponto kun dek pilieroj longas je 765 metroj, ĝia aŭtovojo larĝas je 9 metroj kaj ĝiaj trotuaroj ambaŭflanke de la aŭtovojo larĝas po du metroj. Kamiono kun ŝarĝo de 20 tunoj

povas sekure ĝin trapasi. Tiu ponto kunligas la ŝoseojn Hunan-Guizhou-an kaj Hunan-Guangxi-an, kaj la fervojojn Hunan-Guizhou-an kaj Zhijiang-Liuzhou-an.

## MONTARAJ TIBETANOJ EKUZIS ELEKTRON

La gubernio Diebu de Gansu-provinco situas profunde en Minshan-montaro kaj rezervas abundan akvoenerĝion. En la lastaj jaroj la ŝtato sendis preskaŭ cent teknikistojn al ĝiaj 13 komunumoj por fari esploradon, sinsekve asignis pli ol 4 milionojn da juanoj kaj konstruigis 17 malgrandajn hidroelektrejojn por komunumoj kaj brigadoj. Nun tiu gubernio posedas pli ol 350 elektrofunkciigajn maŝinojn, kiuj faciligis laboron de komunumanoj, kaj krome oni konstruis 31 elektrajn akvolevajjn staciojn, kiuj solvis akvo-provizan malfacilon de surmontaj loĝantoj kaj povas irigacii pli ol 1,000 hektarojn da kampoj. Ĉ. 3,500 el la pli ol 5,000 tibetana familioj de la gubernio instalas elektrajn lampojn.

## LA UNUA ATOMA REAKTORO DE ĈINIO REKONSTRUITA

La nomita reaktoro rekomencis funkciadi post 12-monata rekonstruado. Nun ĝi jam povas kompari sin kun la avangardaj reaktoroj de la sama tipo en aliaj landoj.

Oni rekonstruis ok sistemojn, inkluzive de la interna ŝelo. Ĝia nuna maksimuma potenco pli grandiĝis je 50% ol la antaŭa kaj ĝia izotopa radioproduktiveco kelkoblis.

La atoma energio estas uzata en la kampoj de medicino, industrio, arkeologio k.a. Nun ĉiuj izotopoj uzataj en la ĉinaj hospitaloj estas produktitaj en tiu reaktoro.



## SUKCESOJ DE ĈINAJ GESPORTISTOJ

En sportkunveno okazinta en Novzelando en januaro de 1981, Ĉinio gajnis la viran kaj virinan teamajn ĉampionecojn de tabloteniso kaj kvin ĉampionecojn en la vira kaj virina solludoj, la vira kaj virina parludoj kaj la gea parludo.

Plonĝistoj Jin Weidong kaj Zeng Xilong gajnis la orajn medalojn respektive de vira trampiloplonĝo kaj vira turoplonĝo. Plonĝistino Du Huiying gajnis la ĉampionecon de virina turoplonĝo.

## VENKOJ DE LA ĈINA FLUGPILKA TEAMO

En la Dua Bremena Internacia Virina Flugpilka Konkurso okazinta en FR Germanio, la Ĉina Virina Flugpilka Teamo, venkinte la belgan kaj brazilan virinajn flugpilkaĵajn teamojn egale per 3:0, gajnis venkon super la kuba teamo. La konkurso partoprenis la virinajn flugpilkaĵajn teamoj de Belgio, Brazilo, Ĉinio, Kubo kaj FR Germanio.

## FLUGPILKA TURNIRO INTER ĈINIO KAJ FRANCIO

En la unua tagdeko de januaro en Parizo okazis turniro inter la ĉinaj duaj vira kaj virina flugpilkaĵaj teamoj kaj la francaj vira kaj virina flugpilkaĵaj teamoj. La ĉina virina teamo venkis per 3:0 kaj la ĉina vira teamo perdis la ludon per 2:3 pro malforta defendo.

## ĈINAJ SPORTAJ SPECIALISTOJ TREJNAS ALILANDAĴN SPORTISTOJN



Laŭ invito de Meksikio, Ĉilio, FR Germanio, Tajlando, Kuvajto, Nepalo kaj Irako, Ĉinio sendis siajn dek sportajn specialistojn al tiuj landoj por trejni iliajn gimnastojn, volanistojn, halterlevistojn, piedpilkistojn, flugpilkistojn kaj tablotenisistojn. Iliaj diligenta laboro kaj bona laborstilo rikoltis laŭdojn de tiuj landoj.

## SPORTA CENTRO KONSTRUATA SUR LA MONDA TEGMENTO

La sporta centro en Tibeto en sudo-kcidenta Ĉinio estas en streĉa konstruado. Ĝi konsistas el korbo-pilka ludkampo, piedpilka ludkampo, atletika konkursejo, trejna domo, montogrimpa bazo, pafkampo kaj sun-energia banejo. Finiĝis la unuaperioda konstruado komencita en la 1-a de majo, 1980 kaj nun streĉe iras la duaperioda konstruado. La sporta centro pliriĉigos la kulturan vivon de la tibetaj loĝantoj.

## TRI SPORTAJ REVUOJ ELDONOTAJ

Baldaŭ aperos la ĉinaj sportaj revuoj "Atletiko", "Piedpilka Mondo" kaj "Tablotenisa Mondo", sub la aŭspicioj de la Ĉina Atletika Asocio, la Ĉina Piedpilka Asocio kaj la Ĉina Tablotenisa Asocio. La tri revuoj raportos respektive pri atletikaj, piedpilkaĵaj kaj tablotenisaj konkursoj en- kaj ekster-landaj kaj pri sukcesoj kaj progreso de elstaraj sportistoj, prezentos novajn teknikojn kaj taktikojn kaj konigos sciojn pri juĝista laboro. Respondeculoj de la Internacia Tablotenisa Federacio jam kontribuis al "Tablotenisa Mondo" per siaj artikoloj.



Sen titolo

Pentritaj de  
GUO DAGUANG

## KOLORAJ INFANLIBROJ

### Kapti Vulturon Viva

88-Es-143P 17 × 25cm 60pĝ. £0.45 US\$0.90

### Ribelo kontraŭ la Ĉiela Palaco

88-Es-157P 18 × 21cm 88pĝ. £0.80 US\$1.50

### La Avino-Ursino

88-Es-151P 18.5 × 17.5cm 48pĝ. £0.45 US\$0.90

### Sportistetoj

88-Es-160P 18 × 21cm 24pĝ. £0.22 US\$0.40

### Nova Vesto de la Pupo

88-Es-159P 18 × 21cm 16pĝ. £0.22 US\$0.40

### Ĉion Faru Mem Ni Ĉiuj

88-Es-161P 18 × 21cm 16pĝ. £0.22 US\$0.40

### Konstrui Novan Ponton

88-Es-156S 17 × 19cm 40pĝ. £0.35 US\$0.65

### Geamiketoj en Nia Korto

88-Es-158P 21 × 18cm 16pĝ. £0.22 US\$0.40

### Eldonitaj de la FREMDLINGVA ELDONEJO, BEIJING

*Mendu ĉe peranto de EPC*

*aŭ ĉe la Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN*

*P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio*



## Kantoj kaj dancoj de gaŭŝan-oj

Fotoj de REN SHIYIN



La danco "Pistado"

Gaŭŝan-nacieco kun ĉ. 300,000 membroj estas unu el la naciminoritatoj de Ĉinio. Plejparto de ĝi loĝas en Taiwan-provinco kaj malgranda parto en Fujian, Shanghai, Beijing, Wuhan kaj aliaj lokoj.

La gaŭŝan-oj estas laboremaj, bravaj kaj kreivaj. Iliaj literaturo kaj arto estas riĉaj. En la festotagoj ili kolektive kantas kaj dancas. Kun longaj pistiloj la virinoj pistas rizon ĉirkaŭ la ŝtona pistujo, kaj ilia pistado havas originalan karakterizojn de nacia muziko.

La danco "Ĝojo de Gejunuloj"



Ĥoro



La danco "Legenda Birdo"



# ŜTONAJ SKULPTAJOJ

Fotoj de ZHANG JIAQI,

La ŝtonaj skulptaĵoj de Dazu, Sichuan-provinco de Ĉinio, havas longan historion. Ili estas ŝtonaj artaĵoj kun budhismaj bildoj kiel la ĉefa enhavo. Troviĝas tie pli ol 50,000 skulptitaj budhaj sta-

Kapo de la jada bodisatvo Avalokitesvara




Naŭ drakoj banas reĝidon.


Viro kun bambuaj klakiloj



Unu el la dek prudentaj bodisatvoj



Nirvano de Ŝakjamunio




# ĴOJ DE DAZU

SUN SHUMING kaj  
WANG CHUNSHU

statuoj starantaj en pli ol 40  
lokoj. Tiuj statuoj en diver-  
saj pozoj estas versimilaj.

(Pri detaloj bonvolu legi  
la artikolon "Perlo Enterigita  
en la Dezerta Monto" en tiu  
ĉi numero.)

La bodisatvo Avalokites-  
vara kun rozario



La Mil-mana Bo-  
disatvo Avaloki-  
tesvara

Kokobredistino

